

# La Espero

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

## EL LA ENHAVO

Jarkongreso en Stokholmo 44

Recenzo: Plena Ilustrita  
Vortaro 47

Tiberio Morariu 70-jara 51

Saluto de la Prezidanto  
de UEA 53

Esperantonovaĵoj el  
Finnlando 53

Abono 15 sv. kr.

Poŝtĝiro: SEF 20 12

4

1971

59-a jaro

## SUKCESA JARKONGRESO EN STOKHOLMO



En la urboparto "Söder" en Stokholmo okazis pentekoste la jarkongreso de SEF. Tamen ne en tiuj ĉi belaj malnovaj domoj.

# ÄR DET SÅ SJÄLVKLART MED ENGELSKA?


En Svedujo julio estas la monato de la ĝeneralaj ferioj. La monato kiam la homoj ĝuas liberajn tagojn ĉe la marbordo, en la kamparo aŭ en aŭtoj sur la ŝoseoj, esplorante nian landon aŭ aliajn landojn. Sed ĝi estas ankaŭ la monato, kiam ĉio estas ferma: la fabrikoj kaj oficejoj, lernejoj, eĉ kelkaj vendejoj kaj malsanulejoj. La lando libertempas!

Fermita estis ankaŭ nia presejo, kaj se vi trovas, ke tiu ĉi numero estas iom strange aranĝita — kelkaj artikoloj kaj informoj kiuj estas en la fino devus eble troviĝi sur la unuaj paĝoj aŭ male — tio dependas de la ferioj. Ĉar por ne tro malfruigi la aperon, kelkaj paĝoj estis ne nur redaktitaj sed ankaŭ finkompostitaj antaŭ la fino de junio, kiam ni ne sciis, kio devos ankoraŭ aperi.

Laŭ interkonsento kun la Esperanto-Asocio de Finnlando tiu ĉi numero de La Espero estas sendata al iliaj membroj. Ni kore bonvenigas niajn finnlandajn legantojn kaj esperas, ke nia gazeto plaĉos al ili. Sur paĝo 53 troviĝas finnlanda informakolono. La aranĝo estas eksperimento, kiu ripetigos se ĝi bone sukcesos.

Kaj nia literatura redaktoro baldaŭ estos 70-jara!

Mia unua memoro de Tiberio Morariu datiĝas de la jaro 1934. Tiam li aperis en publika festo "Kinnekulle-Tinget", aranĝita de la esperantisto de Skaraborg, en sunbrila somerdimanĉa posttagmezo, aperis sur tribuno ĉirkaŭita de altaj verdaj foliarboj. Pri Esperanto mi tiam ankoraŭ nenion sciis, sed eksterlandano estis tiutempe malofta aperaĵo en la sveda kamparo, kaj eble la knabo veturis tien nur por rigardi kiel aspektas rumano. Tiberio jam tiam aspektis kiel ordinara homo, sed lia vigla temperamento forte kontrastis al la pli flegma sinteno de la enloĝantoj de tiu parto de Svedujo. Tiam li parolis pri puloj — verŝajne iu cirko — interpretita de loka esperantisto, sed eĉ per tia temo li sukcesis vekti la intereson pri tiu stranga lingvo Esperanto. Al liaj pekaj oni sekve povas aldoni, ke li kulpas ankaŭ pri la esperantistigo de subskribinto.



JULIO-AUG. 1971

Numero 4 59-a jaro

Debatten om språkundervisningen i de svenska skolorna går vidare, och avslöjandena om den lösa grund, som elevernas språkkunskaper byggs på, blir allt mer uppseendeväckande.

Tydligt är att den tid ännu är avlägsen, då engelskan blivit Sveriges verkliga "andraspråk", brukat vid behov av var och varannan människa. Till den svaga grund, som skolan synes ge dagens ungdomar, kommer det faktum att föräldragenerationen i mycket ringa omfattning behärskar engelska hjälpligt.

TRU, alltså kommittén för TV och radio i utbildningen, vill råda bot på detta senare med en omfattande kampanj hösten 1972 för att nå dem som inte kan engelska och få dem intresserade att lära sig det. Man räknar med att 4 miljoner vuxna saknar elementära kunskaper i engelska, uppger man i den bilaga, "Engelska för alla", som åtföljer TRU:s begäran om anslag för budgetåret 1971—72. Man vill med hjälp av TV och radio obemärkt "tvinga på" så många som möjligt intresse för kunskaper i engelska.

Det är emellertid nu tid att allvarligt fråga sig: Skall den svenska skolan och vuxenundervisningen helhjärtat satsa på engelskan som vårt lands andraspråk? Bör man inte avvakta för att se vad som händer ute i världen i debatten om världsspråkproblemet lösning?

Varje turist eller resenär, som varit annorstädes i världen än i de anglosachsiska länderna, vet att möjligheterna att använda engelska är mycket begränsade. I Frankrike vill

man inte höra talas om engelskan som världsspråk, stora delar av världen har spanskan som sitt "lingua latina" och i Östeuropa kommer man inte långt med engelska. Med den alltmer ökande betydelse, som kolosserna Sovjet och Kina får både politiskt och kulturellt, är det tydligt att större krav kommer att ställas på en växande kader av rysk- och kinesisk-kunniga även i Västerlandet. Det är känt att ledande ryssar och kineser vägrar använda engelska, även om de behärskar språket. I förhandlingar mellan varandra föredrar de tolkar — i väntan på en annan lösning av språkproblemet.

Därtill kommer den våg av självkänsla och nationalism, som går genom den tredje världen och som riktar sig även mot den gamla kolonialmaktens språkliga dominans. Starka grupper i Indien utövar påtryckningar mot parlamentet för att överge engelskan som officiellt språk. Liknande symptom är synliga i Afrika.

Den österrikiske presidenten Franz Jonas angrep nyligen i skarpa ordalag språkförvirringen: "Fastän det internationella livet blir alltmer intensivt, fortsätter den officiella världen med de gamla odugliga metoderna för att nå språklig förståelse." Att han därefter pläderar för ett internationellt språk som esperanto är ur hans synpunkt förklarligt, eftersom han är esperantist, men även de som inte närmare studerat den möjligheten till lösning måste hålla med om att de nuvarande förhållandena i längden är ohållbara.

## GRAVA ADMONO DE LA REDAKCIO

Ni atentigas niajn kontribuantojn ke manuskriptoj por La Espero devas esti **tajpitaĵ**, sur unu flanko de la papero kaj kun duobla interlinia spaco.

Lastatempe ni ricevis multajn mane skribitajn manuskriptojn. Ni akceptas tiajn en esceptaj okazoj — ekz. kiam ni scias, ke la sanstato de la skribinto ne permesas al li uzi tajpilon — sed ĝenerale ni devas rifuzi ilin. La liberaj horoj de la redaktoro(j) bedaŭrinde ne permesas retajpdon de manuskriptoj. Se vi ne mem posedas tajpilon, vi certe havos eblecon ĉe iu amiko aŭ oficejo tajpi viajn manuskriptojn. Ni anticipas dankas! **La redaktoroj**

## LA 27-a SVED—DANA ESPERANTOTAGO

okazos en Malmö dimanĉe la 5-an de septembro. Partoprenontoj el Danlando alvenos per la ŝipo je la 9.35-a h. Je la 10-a h okazos akcepto en Riddarsalen en la kastelo Malmöhus, de kie oni post komuna kaftrinkado faros rondveturon en la urbo. Kunestado posttagmeze en la granda salono Skovgaard.

Prezo por la tuta tago en kiu estas enkalkulita matena kafo, rondveturo, lunĉo (kun trinkaĵo kaj trinkmono) kaj partoprenmarko estos 22:— sv. kronoj.

Aligo estas **absolute necesa** antaŭ 28.8.

Oni sin anoncu al Ester Andrén, tel. 040/652 09 aŭ al Ove Krantz, tel. 040/15 86 53.

# OVEDERHÄFTIGT UPPSLAGSVERK!

Uppslagsverket PLUS, band 1, Litteratur. Avsn. Diktens språk, spalt 4—5. Tiden 1963. Hans Hannecke, bearb. Nils Erik Bærendtz.

— — — kanske är det inte bara en nackdel utan också en nödvändighet för dikten att den inte har ett enda språk, **språket** (som musiken och de bildande konsterna), utan flera? Och kanske dessa i sin oändliga mångfald är de enda uttrycksmedel som är till fyllest för diktkonsten. Man har gjort försök med konstgjorda världsspråk, som t. ex. esperanto. *Men kan dikt förbli dikt när den överläts till esperanto? Och är det tänkbart att en diktning kan uppstå direkt på esperanto? Kanske har bägge delar försökts,*

Att kommentera ovanstående är helt onödigt. Uppslagsverket Plus finns nu inte längre i handeln, och eftersom den citerade texten trycktes redan för åtta år sedan är det väl att hoppas, att både artikelförfattaren och bearbetaren docent Bærendtz numera är på det klara med vilken fatal lapsus de gjort sig skyldiga till.

## Lom pri statistiko

Por kio interesigas komencantoj de Esperanto?

La sekvaj informoj baziĝas je reagoj de 100 Esperanto-lernantoj laŭ Esperanto Programita de H. Behrmann, kiuj trastudis la kvar kajerojn kaj poste resendis mendilon, sur kiu ili indikis siajn dezirojn. Tiuj deziresprimoj donas imagon pri la interesiĝoj de tiuj E-lernantoj aŭ novaj esperantistoj, se ni volas nomi ilin tiel.

1. Kiom de tiuj 100 lernantoj volis daŭrigi la studadon de Esperanto per perfektiga instrumaterialo?
  - 22 mendis la perfektigan lernolibron "Post la kurso"
  - 23 mendis vortaron germana—esperanta
  - 15 mendis vortaron esperanta—germana
  - 4 mendis Plenan Vortaron de Esperanto.
2. Esperanto-literaturo kaj renkontiĝoj
  - 52 interesigas pri Esperanto-literaturo kaj petis pri librolisto
  - 45 petis konstantan informadon pri noveldonaĵoj de la E-literaturo
  - 38 interesigas pri E-renkontiĝoj, kongresoj ktp.

*men det är givet att det i båda fallen måste slå slint.* (Kursiverat av red.) Litteratur kan endast uppstå och leva på ett språk som har vuxit fram organiskt, aldrig på ett som är konstruerat. Eftersom dikt i varje avseende är motsatsen till ett destillat, skulle den på ett konstgjort språk vissna som en avsliten blomma. Endast ur det levande språket kan språkliga bilder (metaforer) födas, och dessa är i så hög grad språkelement, att amerikanen Emerson (1803—1882) kunde säga: "Språket är en förstenad diktning" eller: "Diktarna har skapat alla ord, och därför är språket historiens arkiv och — om man så får säga — liksom en musernas grav" ...

Citatet är inte desto mindre ett beklagligt bevis på den tvärsäkerhet, med vilken vissa intellektuella med stor auktoritet dristar sig att uttala sig om saker och ting, som man uppenbarligen inte ens har de mest elementära kunskaper om. Historien är tyvärr fylld av liknande exempel.

Red.

**Konstato:** Nia Esperanto-literaturo do estas grava faktoro por la disvastigo de Esperanto. Montrigas, ke la E-literaturo por multaj homoj estas ĉefa praktika celo.

3. Landa Asocio kaj UEA.
  - 25 interesigis pri aliĝo al Germana Esperanto-Asocio
  - 21 montris intereson por UEA. Kiom fakte poste aliĝis ne estas konate. Tamen la sperto instruas, ke malmultaj fariĝos membroj. Estus interese, esplori la kaŭzon pri tiu negativa fenomeno.
4. Esperanto-gazetaro
  - 10 personoj petis provnumeron de Germana Esperanto-Revuo\*
  - 21 personoj petis provnumeron de revuo Esperanto
  - 22 personoj petis provnumeron de Heroldo de Esperanto
  - 26 personoj petis provnumeron de La Praktiko
  - 24 personoj petis provnumeron de Kontakto

\* De Germana Esperanto-Revuo ĉiu lernanto jam antaŭe ricevis ekzempleron. Do, la lernantoj jam konis ĝin.

Same ne estas konata la nombro de personoj, kiuj poste abonis revuon.

(El **PILO-PRESS**, internacia inform-servo de Ludwig Pickel, Nürnberg)

# 1972

estos interesa jaro. I. a. okazos:

- La SEF-kongreso 20—21—22 majo en Västerås. Preparu vin jam nun.
- Nova "Sunkurso", se eble en majo. Loko: La sveda libertempa' vilaĝo Riva del Sole, Italujo. Kondiĉoj: Minimuma nombro da partoprenantoj sin anoncu tre frue, preferu en la nuna jaro (ĉe Jan Ströme, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö).
- Universala Kongreso de Esperanto en Portlando (Oregon) Usono, 29.7—5.8. Anoncu vin (vidu la lastan paĝon).
- Prelegsemaĵo en Frostavallen denove. Tempo: 30.7—6.8. Petu informojn ĉe Jan Ströme, Amiralsgatan 36, S-211 55 Malmö, Svedujo. "Sveda Somera Semajno" estas altkvalita kaj interesa aranĝo. Nepre aliĝu. Sed petu unue informojn.
- Someraj kursoj en Helsingör, Danujo. Ili estas tre interesaj, kaj ni rekomendas ilin al ĉiuj kursanoj. Informu ilin jam en la aŭtuno. Petu broŝurojn rekte ĉe s-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, DK 8230 Aabyhøj, Danujo, kaj zorgu pri pluraj svedoj en Helsingör.

## ATENTU!

En iu el la aŭtonaj monatoj UEA ekspedos du (2) ekzemplerojn de la revuo "Esperanto" al ĉiuj Membro-Abonantoj de UEA (= rektaj membroj de UEA laŭ kategorio MA).

Ĉiuj membroj estas petitaj uzi la ekstran ekzempleron por varbi novan membron aŭ por abonigi lokan bibliotekon. Necesa varbilo estas aldonita al la specimeno.

Pripensu jam nun, al kiu vi sendu la ekstran gazeton. Demandu jam nun, la personon, ĉu li aŭ ŝi estas MA--membro de UEA, kaj nepre serĉu post la sendado kontakton por doni informojn, por demandi kp. Ni devas havi pli da UEA-membroj. En la aŭtuno aperos en La Espero la kutima anonco pri la UEA-kotizoj por 1972.

SEF

## Brevmarke - Portland

Hjälp till göra reklam för världskongressen i Portland genom att på all post sätta det vackra brevmärket i tre färger. Varje karta innehåller 10 märken.

1 karta kr. 1:40

3 kartor kr. 3:—

Beställes genom att sända likvid till postgiro 14 74 29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).

# SUNBRILO KAJ VARMO

## — La Jarkongreso 1971

Evidente la esperantistoj sopiras al la sveda ĉefurbo, ĉar tre multaj en longa vico de SEF-kongresoj havis lokon ĝuste en Stokholmo, diris la prezidanto de la Sveda Esperanto-Federacio, Jan Strönné, Malmö, en sia malferma parolado je la jarkongreso en Stokholmo pentekoste 1971.

Alie oni ja povus pensi — kaj multaj ankaŭ tion faras — ke urbo tiel granda kiel estas nun Stokholmo, malpli konvenas por jarkongreso kiel la nia: pro la altaj kostoj por loĝado kaj manĝo, pro nia relativa malmultnombro — nia kongreso tute malaperas en granda urbo — kaj pro la jarsezono mem, ĉar je pentekosto, dum la lastaj tagoj de majo, grandurbo ja ne estas speciale alloga.

Sed tiuj kiuj paroprenis la ĉi-jaran kongreson vere ne bezonas penti. Ĉio estis perfekta: la aranĝoj, la vetero (varmo kaj sunbrilo), la situo mem de la jarkongresaj ejoj — ne en la vera centro, tiu de ŝtalo, betono kaj vitro kiu nun kreskas sur la ruinoj de la malnova norda centro de Stokholmo, sed ĉe Medborgarplatsen, la Civitana Placo, centro en la Sudo, la preskaŭ legende fama urboparto sur la deklivo sude de la akvoj, kiuj dividis Stokholmon. Tie renkontis la rigardojn de la kongresanoj ne nur la verdstelajn flagojn sur la Civitana Placo kaj la banderolon "Kongreso de Esperanto" sur la fronto de la Civitana Domo, sed ankaŭ la apartan atmosferon de la Sudo: t. e. pli malnovstila domoj (kvankam ankaŭ tie enpenetras la betonpalacoj), inter ili verdajoj kun ludantaj infanoj kaj bonodore florantaj siringarbustoj, ĉarmaj flankstratoj kaj preĝejoj sur la pintoj de la montoj.

La vera kongresejo estis Medborgarhuset — la Civitana Domo — kie okazis ĉiuj kunvenoj, kaj la plej multaj kongresanoj loĝis en la komforta hotelo Malmen tute apude.



"La Printempo" de Edvard Grieg, lerte ludata de Roland Dupuis, estis en tiu bela pentekosta vespero tre konvena enkonduko je la inaŭgura solenaĵo. Bertil Åkerberg bonvensalutis por la Loka Jarkongresa Komitato, atentigante, ke jam cent jaroj pasis de kiam naskiĝis en la cerbo de juna gimnaziano la ideo, ke facila, neŭtrala, internacia lingvo povus efike kontribui al pli paca kaj feliĉa evoluo de la homaro. La cent jaroj vidis ankaŭ sendube evoluon senkomparan, tamen preskaŭ nur en la teknika kampo, dum en la kultura kaj antaŭ ĉio en la lingva kampo la evoluo pli vere tendencas al komplikiĝo. La idealismo de esperantistoj estas tamen nerompita, kaj s-ro Åkerberg salutis la ĉ. cent dek alvenintajn kongresanojn bonvenaj.

La federacia prezidanto s-ro Strönné varmvorte dankis al LJK, kies prezidantino, s-ino Gun Gerdman, esprimis sian ĝojon kaj kontenton pro vigla intereso de la esperantistoj en Svedujo por la stokholma jarkongreso. Finiĝis la inaŭgura solenaĵo per nova pianludo de Roland Dupuis, polonezo de Frederic Chopin, kaj la komuna kantado de la Esperantista Himno.

Aŭtobuse la kongresanoj poste transportiĝis al Skansen, la fama parko por svedaj naturo kaj bestoj, kie oni en novkonstruita sed malnovstila restoracio Nyloftet kolektiĝis por komuna supeo. Jam pasintan jaron oni forlasis la malnovan kutimon dediĉi parton de tiu vespero al salutoj al la jarkongreso de klubaj reprezentantoj — punkto kiu povis fariĝi iom teda — kaj anstataŭ salutis la kongreson la sola eksterlanda gasto ĝis tiam alveninta, s-ro Monĉilo Pavloviĉ por la Jugoslavia Esperanto-Ligo. (Alia gasto, kiu alvenis nur la postan tagon, estis s-ro Jorma Ahomäki de la Esperanto-Asocio de Finnlando.) Post la manĝo kaj la kafo popoldanca grupo "Söderringen"


prezentis aron da svedaj popoldancoj sub lerta gvido de s-ro Peter Krywulk. La supegastoj mem fine pli aŭ malpli sukcese partoprenis la gajajn dancludojn. La du artistoj de la stokholma grupo krome kontribuis al la sukceso de tiu ĉarma vespero: Roland Dupuis per pianludo kaj Maud Pelz per siaj solkantoj, i. a. "Vårkänning" de Dan Andersson.

Pri la jarkunsido, kiu okupis la plej grandan parton de la pentekosta tago, vidu apartan raporton.

Agrabla surprizo estis la "Distra Vespero" en la pentekosta tago. La programo antaŭe anoncita menciis nur "kun i. a. pupteatro". Kaj ja estis pupteatro. Tre lerte, preskaŭ arte, kaj bonhumore Ingrid Lagerkvist ludis per du el siaj pupoj, kiuj eĉ sciis iom da Esperanto.

Sed la vespero enhavis multon pli! Tie estis la gaja kaj lerta gvidantino mem de la programo, Anna-Lisa Ahlrén, kiu sciis rakonti pri la malnova Stokholmo. Tie estis Åke Ahlrén, aperanta kiel juna studento, pianludante kaj deklamante (i. a. "Eterna Komencanto"), tie estis Bertil Åkerberg kaj Salex en la skeĉo de Tjechov pri la gasto kiu neniam hejmeniras, kaj tie estis Astrid Ljungberg, kiu laŭlegis ĉapitron el la Ruĝa Cambro de August Strindberg — en esperanta traduko — tiu fama romano, kiu krom multon alian redonas la atmosferon de Stokholmo antaŭ cent jaroj. Kaj tie aperis denove Maud Pelz, nun en duetkanto kun Salex (i. a.): Carmencita de Evert Taube. Kaj — mi ne scias, kion mi ankoraŭ forgesis. Entute tre ĝuinda vespero. Malantaŭ tiu programo certe estis multe da laboro. Honoron al la organizintoj!

En la dua pentekosta tago, laŭdire la plej varma ĝis tiam en Stokholmo dum tiu ĉi jaro, okazis la kutima ekskurso, ĉifoje al Drottningholm, la



# JARKUNSIDO DE SEF

## Novaj junaj estraranoj



Ĉi-supre: Tomas Jansson, nova en la estraro.

Ĉi-apude, kol. 1: S-ro Curt Alf prezidis la jarkunvenon.

Kol. 2: "Je la protokolo" s-ro Karl Gustafsson, Malantaŭ li s-ro Strönne.

Kol. 3: La gejunuloj manĝas: Meze: s-ro Pavlovič.

### OBS!

Som framgår av notis å annan plats, får MA-medl. av UEA under hösten vid ett tillfälle 2 ex. "Esperanto". Läs notisen. Låt i c k e extra-exemplaret ligga oanvänt.

SEF

malnova reĝa palaco apud Stokholmo kiu speciale rememoras pri la epoko de la reĝino Lovisa Ulrica kaj ŝia filo reĝo Gustavo la tria. Ni ĝuis la promenadojn en la vasta, bela parko sed eble speciale memoros la viziton al la fama teatro de Drottningholm. Tiu teatro, kiu estis konstruata antaŭ ĉirkaŭ du cent jaroj, restas ankoraŭ hodiaŭ preskau netuŝita de la jarcentoj — eĉ la origina maŝinaro funkcias — kaj estas unika en la tuta mondo.

Je la kafo poste en la restoracio en la parko de Drottningholm apud la lago Mälaren estis la ĝisrevida momento, kiam la prezidanto de SEF, Jan Strönne dankis al LJK kaj ĝia prezidantino Gun Gerdman pro brile aranĝita jarkongreso. Kaj en tiu danko unuigis la tuta kongresanaro. La esperantistoj de Stokholmo povas fieri pri ankoraŭ unu jarkongreso kun bonsukcesaj aranĝoj!

Ake Blomberg

Ankaŭ je tiu ĉi jarkunsido de SEF okazis vigla debato pri la agado. El tiu vidpunkto la jarkongresoj dum la lastaj jaroj fariĝis multe pli interesaj ol antaŭe. Provante redoni la esencan enhavon de la diskutoj kaj traktadoj ni volis elekti tiujn erojn kiuj havas intereson por la neĉeestintaj legantoj. Nia elekto certe fariĝis pli aŭ malpli subjektiva; versajne ni publikigas aferojn, kiujn kelkaj legantoj opinias ke ni estus povintaj ellasi, dum kelkaj partoprenantoj eble ne retrovos ĉi-sube eldirojn aŭ decidojn, kiuj laŭ ili estas pli gravaj. Sed ni nur povas rekomendi al klubaj gvidantoj ke ili, por plene utiligi al si la ideojn el la jarkunsidaj diskutoj, alian jaron mem partoprenu.

### Salutoj

La prezidanto de la Sveda Esperanto-Federacio, Jan Strönne, malfermis la jarkunsidon en la mateno de la pentekosta tago, laŭlegante kelkajn saluttelegramojn, i. a. unu de s-ro Andreo Cseh. Li ankaŭ oficiale kaj varme dankis al LJK kaj transdonis al la stokholma klubo standardeton kiel memoraĵon pri la jarkongreso. Pli poste dum la antaŭtagmezo s-ro Strönne kore bonvenigis la sekretarion de la Esperanto-Asocio de Finnlando, s-ro Jorma Ahomäki, kiu intertempe alvenis.

Jam en la antaŭa vespero oni elektis la funkciulojn por la jarkunsido, kaj la traktadojn lerte kaj elegante gvidis s-ro Curt Alf, Norrköping, kiu estis elektita vic-prezidanto.

En kunligo kun la pritraktado de la jarraporto de la estraro okazis vigla debato. I. a. Olle Olsson, Lund, demandis, ĉu funkcias ankoraŭ la Sveda Esperanto-Instituto, kaj ricevis la informon ke ĝi estas reorganizata.

### Esperanto en la lernejoj

Demando, ĉu aperos ankoraŭ la organo de la junularo, Kvinpinto, igis la prezidanton de SEJU, Tomas Jansson, post jesa respondo al la demando, iom menciis pri la kritiko al SEJU pro la enhavo de la lastaj du numeroj. Ili enhavis artikolojn pri aktualaĵaj mondpolitikaj problemoj, kaj kelkaj el la membroj de SEF opinias ilin tro maldekstre-tendencaj. Tomas Jansson deziris aŭdi la opiniojn de la ĉeestantoj, ĉar la jarkunsido estus laŭ li konvena okazo por diskuti la aferon.

Pri ĝuste tiu afero tamen ne sekvis diskuto — kun la escepto ke Olle Olsson proponis ke oni en Kvinpinto publikigu respondon al la tro unuflankaj artikoloj — sed evoluigis anstataŭ vigla diskuto pri Esperanto en la lernejoj. Torsten Farm, Sundsvall, diris ke ne estas tiel facile enigi Esperanton en la lernejoj laŭ la novaj reguloj pri "libere elektita temo" pro la retenema sinteno de la lernejaj estraroj.

Aliaj plendis pri tio, ke estas malfacile trovi personojn kiuj dum lernejaj horoj, t. e. dum la tago, povas liberigi por instrui Esperanton. Olle Olsson tamen kredis, ke ne estas absolute necese havi la lecionojn dum la tago; oni povas ankaŭ en interkonsento kun la gelnantoj aranĝi en la vespero.

### Lernolibroj

Oni denove revenis al la malnova problemo pri niaj lernolibroj. Iva Aberg akcentis, ke nepre mankas taŭgaj lernolibroj por instruado de Esperanto en Svedujo kaj ne volas konsenti, ke mankas mono por eldono. "Kiam oni povas kolekti monon por monumentoj, kiuj tute ne necesas oni povas kolekti monon por lernolibroj, kiuj des pli necesas," ŝi diris. Iu menciis pri la Cseh-metodo, kiu ja ne postulas lernolibrojn, kaj la diskutantoj ĝenerale interkonsentis, ke tiu kurso ja estas bonega, sed ankaŭ ĝi devas esti prilaborita kaj modernigita por respondi al la bezonoj de la hodiaŭo.

### Novaj kotizoj

La ekonomia raporto montris deficion de ĉ. dek mil kronoj por 1970. Konsiderinde kreskis la kostoj por La Espero. Por 1970 tiuj tamen fariĝis eksterordinare grandaj, ĉar ili inkludas pagon por kompostitaj sed ne uzitaj tekstoj, kiuj kolektigis en la daŭro de multaj jaroj, kaj pro malaktualigo nun estis forĵetataj. (Ĉar la presejo ricevas pagon por kompostita teksto nur kiam ĝi estas presita, tiuj tekstoj ne estis pli frue pagitaj.)

La dua granda elspezo rilatas al la kostoj por la oficejo ĉe Jungfrugatan.

Ĉar ni volas daŭre kaj aperigi la gazeton kaj havi oficejon ne ekzistas alia ebleco ol altigi la enspezojn, t. e. la membrokotizoj. La estraro havis ĉi-jare nur proponon altigi la kotizon por la rektaj membroj, kaj aldone al tiu estis propono pri eta altigo de la kotizo por klubaj membroj. La jarkunsido tamen unuanime decidis, post tre mallonga diskuto, fiksi

la jarkotizon por 1972 je 15 krj por klubaj membro (ĝis nun estis 10 krj) kaj 25 krj por rekta membro. Oni ja antaŭvidis, ke tro malgranda altigo nun postulus novan altigon post ankoraŭ unu jaro, kaj esperis ke la kluboj kaj membroj komprenos la situacion.

#### Plijuniĝo de la estraro

La federacia prezidanto Jan Strönne estis unuanime reelektita, kaj same la estrarano Bertil Akerberg, la laste nomita por du jaroj. Oni aligis al la estraro du novajn anojn, nome la prezidanto de SEJU, Tomas Jansson, por du jaroj, kaj s-ino Ulla Luin por unu jaro. Tomas Jansson anstataŭas Maria Wästfelt, kiu deziris forlasi sian oficialan postenon en la estraro sed tamen promesis resti kiel kasistino. Ulla Luin anstataŭas Artur Malmkvist, kiu prizorgas la oficejon de SEF kaj restas en la estraro kiel anstataŭanto. Forlasis la estraron la anstataŭanto Gösta Norling, Uppsala.

Kvankam ni devas esti dankaj al la eksigintaj estraranoj pro ilia multjara sinofera agado ni devas ĝoji pri la konsiderinda plijuniĝo de la estraro, kiu estas la rezulto de la elektoj.

Revizoroj estas Eva Törnskog, Älvsjö, kaj Nils Johansson, Norrköping. Elektoprepara komitato: Harry Törnskog (kunvokanto), Harry Eklund, Tiberio Morariu kaj Gun Gerdman.

#### Västerås por 1972

Kiel kongresurbon por 1972 oni elektis Västerås, urbo sen aktiva esperanto-societo. Tia mankis ankaŭ en Jönköping, la urbo de la jarkongreso 1970, kaj la eksperimento aranĝi jarkongreson en tia loko tiel bone sukcesis je tiu okazo, ke oni volas fari novan provon sekvontjare.

#### Agado de la kluboj

Post la luncŝpaŭzo okazis diskuto pri la agado de la lokaj kluboj. Tri mallongaj enkondukoj estis antaŭe interkonsentitaj. **Sven Alexandersson**, sekr. de SEF, parolis pri "Esperanto-klubo, la plej grava ĉenero de SEF", **Franko Luin** pri "La taskoj de la kluboj" kaj **Jan Strönne** pri "Informado kaj kursoj".

S-ro Strönne rakontis pri la Informa Vespero kiu ĉiujare aranĝas la kluboj en Malmö por la ekstera publiko. Kio plej gravas tie ne estas la unua parto kun oficialaj informaj paroladoj pri la lingvo kaj la movado, sed la dua parto, kiam oni kolektas la partoprenantojn por kaftrinkado kaj pli intima interbabilado.

Klubo en iu alia loko faris interesan eksperimenton distribuante broŝurojn pri Esperanto. Oni koncentriĝis je kelkaj kvartaloj en la urbo kaj distribuis broŝuron al ĉiu persono tie loĝanta. Post unu semajno oni denove distribuis al la samaj personoj, kaj poste oni ripetis la aferon ankoraŭ

unu- aŭ dufoje en la daŭro de kelkaj semajnoj. Ankoraŭ estas tro frue prigi la rezulton.

La vic-prezidanto de UEA, **Erik Carlén**, kiu salutis la jarkunsidon en la nomo de la asocio, akcentis la signifon de la unuopaj kluboj. Ili devas esti la fundamento de nia movado. Li proponas, ke klubo aŭ individuo kiu havas sugeston aŭ proponon pri la agado kiu povas esti valora ankaŭ por aliaj kluboj aŭ por la tuta movado, ĝin komuniku al la redakcio de La Espero por aperigo en la gazeto. (Ni volonte transdonas la proponon de s-ro Carlén al niaj legantoj! La red.)

#### Lingvaj problemoj de la enmigrintoj

S-ro **Monĉilo Pavloviĉ** laŭtleĝis oficialan salutleteron de Jugoslavia Esperanto-Ligo, kiu kun bedaŭro menciis pri la antaŭ nelonge okazinta murdo de la jugoslava ambasadoro en Stokholmo, s-ro Roloviĉ, kaj tuŝis la gravan problemon rilate al la sentoj de fremdeco de jugoslavaj enmigrintoj en Svedlando. La jugoslava asocio petis, ke SEF esploru la eblecojn aranĝi Esperantokursojn por enmigrintoj kune kun svedaj kursanoj, ĉar tio povus plifaciligi la kontaktojn inter ili kaj la sveda loĝantaro.

Tio instigis al sufiĉe vigla diskuto, ĉar la problemoj ja ne estas limigitaj nur al la jugoslavoj, sed koncernas ĉiujn grupojn de eksterlandaj laboristoj en Svedujo kaj ne malplej la granda finna grupo. Evidente la angla ankoraŭ ne okupas tiun pozicion, kiun kelkaj pledantoj por ĝi kredas ke ĝi jam atingis, ĉar en tia okazo la fremdeco kaj konfliktoj, kiujn kaŭzas la lingvaj baroj inter la enmigrintoj kaj la svedaj enloĝantoj; ne estus tiel oftaj. **Bertil Akerberg** demandis, ĉu oni ne povus ricevi specialan ŝtatan subvencion por tiaj kursoj. **Strönne** tamen ne kredis, ke tio estas facile atingebla, ĉar la aŭtoritatuloj unuavice volas instrui la svedan al la enmigrintoj, kaj tion oni ja apenaŭ povas kritiki. Ankaŭ aliaj parolantoj substrekis, ke estas malfacile por ni atingi tiujn grupojn, ĉar ili volas unuavice lerni la svedan. Oni tamen decidis rekomendi, ke la kluboj en lokoj, kie troviĝas enmigrintoj, informu ilin pri la ekzisto de la esperanta societo kaj bonvenigu ilin al niaj kursoj.

#### Fermo de la jarkunsido

Finigante la longan kaj interesan debaton, la funkcia prezidanto **Curt Alf** kore dankis al la estraro de SEF pro ĝia sindona laboro, kaj apartan dankon li direktis al la federacia prezidanto, Jan Strönne, samtempe li bonvensalutis gejunulojn, kiuj nun eniris la estraron, esprimante la esperon, ke tiu juna sango donu novajn impulsojn por fruktodona laboro por la esperantomovado en nia lando.

obo



Geveteranoj **Julin** kaj **Asplund** antaŭ la preĝejo.

#### LA DISERVO

**KELI** — Kristana Esperantista Ligo Internacia — estis la aranĝanto de la diservo en la mateno de la dua pentekosta tago, antaŭ la ekskurso al Drottningholm.

En la belega mateno la partoprenantoj kolektiĝis en la ĉarma eta Preĝejo de Ĉiuj Sanktuloj (Allhelgonakyrkan) sur la altaĵo proksime al la kongresejo.

La gvidantino de la Distra Vespero en la antaŭa vespero, **Anna-Lisa Ahlren**, nun aperis kiel gvidantino ankaŭ de la diservo. Ŝi diris enkonduke, ke tiuj kiuj partoprenis la antaŭan vesperon eble surpriziĝas vidi ŝin en tiu nova rolo, sed la kontrasto ne estas tiel granda, kiel iuj eble facile kredas. Kiel kristano ŝi sentas internan ĝojon, kiu permesas al ŝi esti ĉiam gaja.

Predikis **Erik Carlén**, kaj li akcentis, ke kvankam en la kristanismo ekzistas diversaj eklezioj, kiuj aranĝas siajn diservojn ĉiu en sia aparta maniero, ili havas ĉiuj tamen ion komunan: la personon de Jesuo Kristo. La ritoj kaj reguloj de la diservoj certe tre gravas, sed oni ne forgesu, ke ili estas rimedoj, nur iloj. Sole gravas la Persono.

**Janet Enghart** per siaj solkantoj bele kontribuis al la solena etoso de memorinda mateno.

A. B.



Loka Jarkongresa komitato.

# NI HAVAS KANONON

## Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto

Dum la jaro 1970 aperis **PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO**. Por la Esperantomovado tio estas grava evento. Ĝi estas la plej granda Esperanto-vortaro ĝis nun aperinta, kaj ĝi — kiel diras ĉi-sube nia recenzisto — "inaŭguros novan epokon en la vivo de nia lingvo". Ni tial opinias, ke estas tute konvene dediĉi sufiĉan spacon al detala analizo de tiu granda verko, kaj ni esperas, ke niaj legantoj ĝuos la artikolon. Vi ne bezonas esti lingva spertulo por ĉerpi el ĝi interesajn kaj utilajn informojn. Recenzas: **DOCENTO EBBE VILBORG, MEMBRO DE AKADEMIO DE ESPERANTO**.



La "Plena Ilustrita Vortaro" (PIV) estas la plej granda Esperanto-vortaro aperinta. Ĝi estas eĉ la plej ampleksa vortaro entute en la interlingvistika kampo (la antaŭulo Plena Vortaro ne povis rivali kun ekzemple *Ido-English Dictionary* de Dyer, 1924). Sopire atendita dum multaj jaroj, ĝi donas bazon por estonta evoluo de la internacia lingvo kaj forigas la necertecon pri la ĝisnunaj atingoj de nia vortprovizo. Por planlingvo, difina vortaro ja estas eksterordinare grava, ĉar tia ne posedas tiom da stabiligaj faktoroj (lernejoj, amaskomunikiloj, teatro, daŭra uzado) kiom la naciaj lingvoj.

### Amplekso

La manuskripto enhavis, laŭ la antaŭparolo (p. xi), ĉ. 15 250 artikolojn (do = radikojn, laŭ la tradicia esperanta kalkulmaniero). Por konstati kiomgrade ĝi superas siajn antaŭulojn, mi kalkulis la nombron de radikoj sub A kaj J. Jen la nombroj:

	A	J
Wüster, Enciklopedia vortaro esperanta—germana	1 362	29
Plena Vortaro	634	17
Waringhien, Grand dictionnaire Esperanto—français	1 190	36
Butler, Esperanto—English Dictionary	771	31
Plena Ilustrita Vortaro	1 408	39

Oni vidas el tiu tabeleto, ke PV atingis nur duonon de la amplekso, kiun estus havinta la giganta enciklopedia vortaro de Wüster, se ĝi estus finita. Tamen la unua loko de PIV estas nedubebla.

**Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto**. Eldonita de Sennacieca Asocio Tutmonda, Parizo, 1970. 1 344 paĝoj. Formato 15 × 20 cm. Havebla ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö. Prezo sv. kr. 162: 35.

### Aspekto

Tiuj, kiuj posedas la Eo-anglan vortaron de Butler, rekonas ties aspekton (kvankam, kompreneble, pligrandskale) en PIV. Ambaŭ vortaroj estas presitaj de *The Blackburn Times*. La preso estas perfekta, la papero senripoĉa. La hele verda bindaĵo ankaŭ estas analoga al tiu de Butler. Tre gustoplena kaj bela, ĝi tamen vekas dubon ĉu ĝi estas sufiĉe fortika por toleri dumjardekan uzadon (la libro ja estas tre dika). PIV havas krome ŝirmkovrilon papiran de iu ruĝbruna kolornuanco.

### Kunlaborantoj

PIV efektive estas kombino de du vortaregoj: la ĝenerala, por kiu respondecas prof. G. Waringhien, prezidanto de la Akademio de Esperanto, kaj la faka, kies multajn partojn verkis diversaj specialistoj kaj kies tuton organizis R. Haferkorn, direktoro de la sekcio "Teknika Vortaro" en la Akademio. La listo de fakoj reprezentataj per specialaj sekcioj ampleksas ne malpli ol 77, (niaj ekspertoj S. Alexandersson kaj K. J. Moberg kontribuis al resp. elektrotekniko kaj konstrutekniko), sed la nomlisto ne estas same multflanka (ekzemple, G. Waringhien aperas sub 25 fakoj!). Iom strange, la fako "lingvistiko" ne estas atentata; sed por "filologio" kaj "gramatiko" respondecas Waringhien.

Estas necese akcenti, ke PIV ne havas akademian sankcion, kvankam la prezidanto de la Akademio estas ĝia ĉefaŭtoro. Mi estas ano de la Akademio depost 1963, kaj mi povas konstati, ke la akademianoj dum tiuj jaroj de finpretigo estis demandataj pri neniuj detaloj en PIV; ni eĉ ne estis informataj pri la ekzakta aranĝo de la vortaro aŭ pri la progreso de la laboro. Tiu ĉi giganta vortaro grandparte estas unuhoma verkajo kaj respegulas la preferojn de unu persono.

### Aranĝo de la materialo

Mi parolis pri du vortaroj, sed ili kompreneble estas komplete kunfanditaj en unu alfabeto serio. La laŭ-alfabeta ordo estas strikta kaj pli ekzakta ol en PV, kiu enhavis ne malmultajn erarojn tiurilate. Oni disigas la radikojn de la finaĵo per/ (tia indiko mankis en PV). La fundamentaj radikoj estas indikitaj per steleto, la ceteraj oficialaj per la numero de la O. A., en kiu ili estas registritaj (1—7). Oni ne uzas majusklojn por indiki oficialecon. Entute, la diferenco inter oficialaj kaj neoficialaj radikoj ne estas tre rimarkebla en PIV. Tio kongruas kun la fakto, ke la esperantistaro tendencas neglekti tiun kategoriigon. La karaktero de faktermino estas indikita per signo, plej ofte bildsimbolo, por la apartaj fakoj: koro por anatomio, kranio por paleontologio, leviganta suno por geografio. Por poeziaj vortoj oni elektis la hebrean literon ŝin, kiu similas al liron. Oni ŝanĝis la PV-signon ĉevalo por zoologio (por ke amebo ne estu signita per ĉevalo) je pli neŭtrala simbolo. — En ĉiu artikolo, la interna ordo estas jena: radikoj + finaĵoj (-o, -a, -i, -e); radikoj + sufiksoj; radikoj + radikoj(j); prefikso + radikoj; radikoj + radikoj /+ sufikso/(tio signifas konkrete: akvo, akva, akvi; akvaro, akvumi; akvokondukilo; elakviĝi, senakva; okulakvo, trinkakvo...). Ambigua do estas la traktado de "radikoj + radikoj": principe oni serĉu sub la lasta radikoj, sed ne ĉiam: **marmalsano** estas sub **maro**, ĉar la plej signifnifa ideo en tiu komplekso estas "mar". Waringhien petas, ke oni pardonu subjektivecon en tiu elekto.

Sekvas la diversaj signifoj de ĉiu unuopa vorto (la epoko de unusenceno jam estas malproksima!). La aŭtorsignoj estas mirige malmultaj: Z, G. (Grabowski), B (Bein), K. (Kalocsay), X (Malnova Testamento), N (Nova Testamento). Ĉu vere ne

iu pli moderna meritus esti citata? Bedaŭrinde oni ne kiel Wüster indikas la lokojn de la citaĵoj el Zamenhof. — La difinoj plej ofte baziĝas sur tiuj de PV, sed ili estas pliprecizigitaj (tipo: **babili** PV "intime, familiare interparoli", PIV "abunde kaj suprajte paroli pri negravaj aferoj"). PIV ofte tiel amplekse difinas, ke ĝi estas uzebla kiel enciklopedieto. Laŭ mia opinio, oni devus laŭeble distingi inter vortaro kun leksika tasko kaj enciklopedio kun informacia ambicio; PIV ne klare metas tiun limon. — Post la difino, e k z e m p l o j. Sed tiaj ne ĉiam estas bezonataj. Se substantivo estas ĝuste difinita kaj ne ludas iun frazeologian rolon, ne necesas ekzemplo pri ĝia uzo. "Kelkaj el la plej saĝaj provizis sin per buterpanoj" ni legas sub **pano**: kion diras tiu frazo pri la signifo aŭ la uzo de la vorto **buterpano**? Ankaŭ PV multe pekis en tiu rilato. Generale tamen la ekzemploj en PIV estas pli bonaj, pli multaj kaj malpli torditaj ol tiuj en PV. — Oni ne intermiksi difinon kaj ekzemplon. Sub **gramo** rolas kiel ekzemplo: "la g. prezentas la mason de unu kubcentimetrom da pura akvo je 4 gradoj C", sed tio envere estas parto de la difino, ĉu ne? — El la ekzemploj la leganto devas eltiri la esperantan frazeologion. Ĉar — kaj tio estas stranga kaj bedaŭrinda fenomeno — PIV ne funkcias principe kiel frazeologia vortaro. Ofte estas necese legi plurajn, multajn ekzemplojn antaŭ ol trovi la ĝustan prepozicion ĉe verbo, la adekvatan verbon kombineblan kun agsubstantivo. Tuj post la apero de PIV mi legis n-rojn 7—8, 1970, de La Espero. El ĝi mi ĉerpis kelkajn frazojn, kiujn mi esperis trovi en la vortaro sed ne trovis: parolado de Lapenna en traduko; havi ion en freŝa memoro; forgesi pri io; alterne kun; najli ion al io; /dia/ beno super /Eo/; urso servo; maltro da. La uzantoj de PIV sendube deziras kaj serĉos helpon en multegaj analogaj kazoj. Oni povas kompreneble respondi, ke Eo estas tiel riĉa lingvo, ke ne eblas ĉion tian registri. Prave, sed kial ne almenaŭ doni komence de ĉiu iom granda artikolo sisteman liston pri la plej ordinaraj sintaksaj konstruoj de la koncerna vorto?

Multaj artikoloj finiĝas per montrado al alia. Je tiu punkto, PV ŝajnas al mi esti pli bona ol PIV. Ĉe la signo "Kp." PV donis listojn de sinonimoj kaj kvazaŭsinonimoj tre utilajn. La montradoj en PIV estas ofte tre neprecizaj, kaj pri vera sinonimiko ne temas. Ĉe **Normano** oni montras al **Boŝmano**: kion komunan havas tiuj du popoloj krom la elemento -man- (kaj PIV ja ne estas etimologia!)? Cetere mi dubas, ke tia rondvojaĝo en la artikolaro (de **adjektivo** al **epiteto** kaj **predikativo**, de **epiteto** al **predikativo**, de **predikativo** al **epi-**

**teto**) povas esti esenca tasko de vortaro kia PIV. Sinonimoj jes (ili povus esti enmetataj en aŭ tuj post la difino) — ideasocioj ne!

#### Pri la vortmaterialo

La plej multaj radikoj en PV kompreneble reaperas en PIV. Kelkaj tamen malaperis; mi notis **ami-antio**, **artikuloj**, **baroskopo**, **celoidino**, **cenomano**, **cikloido**, **dinamotoro**, **divalento**, **eritrozino**, **erbino**, **jako**, **komatulo**... Evidente ĉefe temas pri teknikaj kaj sciencaj terminoj (arĥaigintaj?).

Rimarkinde diferencas PV kaj PIV rilate gramatikan karakteron de radikoj. Por la oficialaj radikoj, PV kaj la aldonoj plej ofte donas klaran indikon pri tio; pri kelkaj oni diskutis en la Akademio, kaj la rezulto videbliĝos en la venonta Baza Radikaro oficiala. Sed rilate neoficialajn vortojn la kriterioj ŝajnas tute manki. Tiel **afekcio** PV estas -i PIV; **alarma** PV: -i PIV; **aperti** ("öppna") PV: -a ("öppen") PIV; **ekspresa** PV: -o PIV; **kohera** PV: -i PIV; **koncesii** PV: -o PIV; **kvitanco** PV: -i PIV. En kelkaj okazoj, la etimologio povas rekomendi certan kategoriecon (**koncesio**, **koheri**), sed tio kompreneble ne povas esti normiga.

Kelkaj formŝanĝoj ankaŭ okazis survoje de PV al PIV; **akro** (mezuruno) fariĝis **akreo**, **dermito** — **dermatito**, **eksposi** — **eksponi**, **komao** — **komato**. **Konversi** en PV estas io tute alia ol **konversi** en PIV ("konvertita" resp. "konversera").

Kio donas apartan karakteron al PIV tamen estas la alfluo de novaj radikoj nekonataj al la uzantoj de PV. Tiujn novaĵojn ni povas klasifiki jene:

(1) Z-aj vortoj preteratentitaj en PV. Waringhien zorge kaj ĝisfunde elĉerpis la zamenhofan verkaron por tiu ĉi vortaro. Tiel aldoniĝis ne malmultaj radikoj, el kiuj kelkaj tamen okazaj (interjekcioj k. s.). Male, kelkaj vortoj kiuj en PV estis markitaj per "Z" perdis tiun signon: **alo**, **babordo**, **bravisime** (tute ne en PIV), **klemato** (PIV **klematido**). Manke de fontindikoj entute estas neeble prijuĝi tiun ĉi gravan sektoron de nia vortaro; ni devas fidi la rezultojn de Waringhien.

(2) Modernaj vortoj internaciaj, komunuzaj kaj jam vaste disvastigitaj: **aerogramo**, **aerosolo**, **anorako**, **astronaŭto** (ankaŭ **kosmonaŭto** samsignifa), **engaĝi**, **enorma**, **jeto**, **kafeterio**... Per tiu registrado nia lingvo faras decidan paŝon antaŭen en direkto al aktualigo kaj ĝisdatigo de la vortaro. Kelkaj novaj mallongigoj pli-malpli internaciaj ankaŭ aperas: **avio** (aviadilo), **labo** (laboratorio), **pneŭo** (pneŭmatiko); sed **ekspo** mankas.

(3) Grandega nombro da sciencaj kaj teknikaj fakterminoj. Ili devas esti prijuĝataj de specialistoj de ĉiu

aparta fako. Estas tamen klare videble, ke multaj el ili havas civitanecan en Eo laŭ la 15-a regulo pri (internaciaj) fremdvortoj. (Mi nur preterpasante notu, ke la fako "interlingvistiko" ŝajnas esti nesufiĉe reprezentata. La vorto ekzistas — sub **lingvo** —, sed mi ne trovis **planlingvo**, nek **naturalismo** kun sia interlingvistika senco, kaj el niaj konkurantoj troviĝas nur **Ido** kaj **Volapük**, ne **Interlingue** nek **Interlingua**.)

La akcepto de ĉiam pli multaj internaciaj vortoj foje rezultas en preskaŭ similaj radikoj, memore malfacile distingeblaj. Setälä (Esperanta Finnlando 1, 1971) citas el PIV la jenajn radikojn el la latinaj elementoj con "kun" kaj pon- "meti": **komponi**, **komposti**, **kompoŝto**, **kompoto**, **kompozicio**, **kompozita**, **kompozitaĉoj**, **kompozitoj**. Malgraŭ ĉio ni estas ja kontentaj, ke Eo klopodas diferencigi la radikojn unu de la alia! Ĉiokaze ne estos eble al naturalismanoj aserti, ke Eo malatentas la internaciajn vortojn kaj ke tiuj "ne ekzistas" en Eo. Eĉ internaciaj afiksoj, se ili ludas terminologian rolon, ricevis apartan pritrakton (-**ator/o**, -**anc/o**, **des-**, **ed-**, **-oid** ktp).

(4) Waringhien volis riĉigi nian lingvon sur la kampo de la ĉiutaga vivo, kie ĝi estas malmulte praktikata. Li tial enmetis centon da radikoj markitaj per "N" (= neologismo por ĉiutagaĵo). Oni do uzu ilin kun prudento kaj "al jam sperta publiko" (laŭ la antaŭparolo). Mankas loko por redoni ĉiujn, sed por ke miaj legantoj ekkonu kaj provadu la materialon, mi notas kelkajn dekojn el ili: **asidua** "trägen", **ascendi** "gå upp", **basa** "läg", **bideo**, **bobelo** "bubbla", **boko** "bock", **buero** "byrå", **burso** "börs", **buso** "buss", **cico** "bröstvärt", **cis** "hitom", **ĉipa** "billig", **dabi** "badda", **devanci** "köra förbi", **diminui** "förminska", **dura** "hård", **elano** "ansats", **fango** "dy", **febla** "svag", **glebo** "jordkoka", **hojli** "yla", **kaputa** "sönder", **kibico** "en som stör andras kortspel med goda råd, en som lägger sig i", **kiĉo** "skräp, hörtorgskonst", **kirko** "kyrka", **kompano** "kumpan, kompis", **kripo** "krubba", **kvesti** "samla in pengar, ta upp kollekt", **lavabo** "tvättställ", **lici** "vara tillätet", **liki** "läcka", **loza** "lös", **lukri** "tjäna (pengar)", **magra** "mager", **merdo** "skit", **moreloj** "eldhund", **noĉi** "skada", **obskura** "mörk", **opresi** "förtvicka", **ovri** "öppna", **pelmele** "röra, virrvarr", **poltrono** "feg usling, pultron", **prohibi** "förbjuda", **reverso** "baksida", **ronĝi** "gnaga", **rujo** "rouge", **sinistra** "olycksbådande", **sinuo** "krök", **skoldi** "skälla på, banna", **skipo** "(arbets)skift", **supla** "mjuk, böjlig", **temerara** "våghalsig". Tre heterogena listo: apud vortoj jam multfoje uzitaj, parte kun sufiĉe granda internacieco, aperas absolutaj novaĵoj bazitaj sur unu nacia lingvo.



Ankoraŭ pli miksite estas la vortkategorio "poeziaj terminoj": tie troviĝas pure teknikaj fakvortoj (**anapesto**, **hemistiko**) sed ankaŭ multaj antonimoj de mal-vortoj (**olda**, **povra**, **disto**), kaj aliaj iom banalaj terminoj (**mungi** "snyta", **koŝmaro** "mar-dröm"...). Entute mankas konsekvenco en la sistemigo de tiuj du kategorioj: **sordida** "smutsig" estas poezia, sed **timida** "blyg" estas ĉiutagaĵo; **pigra** "lat" estas poezia, sed **magra** ĉiutagaĵo; **glaŭka** "blågrön" estas poezia, sed **rufa** "gulröd" ĉiutagaĵo! PIV riskas senesperige konfuzi la lingvuzon kaj konsterni la lingvuzantojn sur tiu ĉi grava kampo de ĝeneralaj neologismoj.

Ĉe alprenado de novaj vortoj (ĉu sciencaj-teknikaj, ĉu komunuzaj) PIV aplikas principojn, kiujn mi kredis mortintaj. Novaj vortoj kun ĥ aperas; malgraŭ malfacila prononcebleco la vortoj kun -sc- plimultiĝis; -kz- estas uzata en kelkaj novaj radikoj; la uzado de duoblaj konsonantoj plivastiĝis. Ĉu pro tradiciemo aŭ rutino?

(5) Gramatikaj vorteroj kaj vortetoj. La plej bazaj elementoj de nia lingvo, **o**, **a**, **i**, **e**, **as** ktp, trovis sian alfabetan lokon en PIV, ofte kun komentarioj. El praktika vidpunkto, tiu aranĝo estas sensignifa, ĉar apenaŭ iu serĉas ilin tie; sed laŭ la moderna morfemika koncepto pri la lingvo estas ĝuste, ke ĉiuj lingvaj komponantoj estu egale traktataj. La enmeto de tiuj elementoj estas ankaŭ konforma al la analiza metodo, laŭ kiu Zamenhof konstruis Esperanton.

Kompreneble tiu gramatikigo de la vortaro koncernas ankaŭ la problemon de la pasivo, kie Waringhien estas gvidanto de unu el la disputantaj partioj. Ĉie, kie li povis tuŝi la temon, li enmetis avertojn kaj regulojn: sub **at**, **it**, **pasiva**, **participo**... (Tamen **tempo** estas korekte difinita: "Konjugacia formo, montranta, ke la priparolata ago estas nuna, pasinta aŭ estonta".) Komparante PV, oni povas konstati, kiajn ŝanĝojn en la lingvuzo

kuntrenas aplikado de la itismo. En PV — tiom pli proksima al la epoko de Zamenhof! — "la franca akademio estis fondata" (PIV: fondita). En PV (sub **kalvario**) "Jesuo estis krucumata" (PIV evitas la frazon). Unu detalo tamen montras klare, kiel malfacila estas konsekvenca praktikado de itismo, eĉ en vortaro: laŭ Waringhien "estis naskita" ja signifas "naskiĝis", sed estus tro absurde perifrazi en la vortaro **naskiĝi** per "esti naskita" (la agon per la rezulto!); tial ni trovas **naskiĝi** = **esti naskata** (tute ĝuste, sed kontraŭ la eldiroj de la aŭtoro mem!). Sub **pluskvamperfekto** ni lernas, ke tiu tempo ne ekzistas en Eo. La "pruvo" estas la z-a frazo "kiam vi vidis nin en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron" (Ekz. § 24). Sed oni "forĝesas" ĉiti la reston de tiu frazo: "(aŭ li estis dirinta al mi la veron)", kiu ja montras, ke estinta antaŭtempoco estas esprimebla per du manieroj en Eo: aŭ per adverbo, aŭ per nura konjugacia formo. La tuta disputo estas cetere prisilentata en la vortaro, kvazaŭ nur ekzistus unu opinio; la terminoj "atismo" kaj "itismo", uzitaj milfoje dum la pasinta jardeko, ne troviĝas (dum ekzemple **adasismo**, nuntempe apenaŭ uzata, enestas). Struta politiko!

La vortaristo esperantaj konstante estas en dilemo inter la devo registri faktan uzadon kaj la tento enkonduki proprajn novaĵojn. Nu, pri la materialo en PIV necesas fari gravan rezervon: **en PIV troviĝas multo, kio ne estas Esperanto** — nuraj proponoj, preferoj kaj idiosinkrazioj de la ĉefaŭtoro. Jen kion mi ekzemple trovis: konjunkcio **ajne** — **ajne** "antingen — eller" (proponita jam en Plena Gramatiko, sed mortnaskita); estiel "kiel" ("li mortis estiel kristano"); prepozicio **fri** (**fri dogano** "tullfritt"); **nen** (amputaĵo el **neniu** ktp) kiel adverbo ("voĉdoni nen"); **sor** "uppåt" kaj **sob** "neråt" (proponitaj jam de Z sed neniam uzitaj); kondicionalaj participoj **-unt-** (kun

## ITALA KONGRESO APUD RIVA DEL SOLE

La 42-a Itala Esperanto-Kongreso okazos dum la semajno 18—24/9 en **Marina de Grosseto** tuj apud la Resovilaĝo Riva del Sole. En la programo estas i. a. danĉesto en Riva del Sole mem. Informojn kaj aligojn ĉe la ORGANIZA KOMITATO, ĉe "Rag. Delio Dondoli", Via Fucini 17, 581 00 GROSSETO, Italio.

nekomprenebla ekzemplo: "eĉ perfiduntan ŝin mi volas mia"!), **-ut-** ("la ofendutoj pardonu!") Legante tiaĵojn oni rememoras la severan kritikon de Paul Nylén pri Plena Gramatiko, kies unu aŭtoro estas Waringhien: "Neniel estas la demando pri konstato de realaj fenomenoj de la lingvo vivanta, sed pri supozoj kaj proponoj de la aŭtoroj!" (La Espero 3, 1936, p. 47).

(6) Nomoj propraj. Ili apartenas al diversaj kategorioj:

(a) Geografiaj nomoj, ĝenerale esperantigitaj. Bona ideo estas identigi tiujn nomojn per indiko de longitudo kaj latitudo; ankoraŭ pli bona ideo estus aldoni mapon. Parolante pri mondmapo: multaj nomoj ial diverĝas de tiuj proponitaj de la internacia komisiono, ekz. **ĉilio** (kom.: Ĉilo), **Izraelio** (Israelo), **Kongolo** (sic!; kom.: Kongo), **Nigerlando** (Nigerio), **Meksikio** (Meksiko); **Atlantiko**, **Pacifiko** (Atlanta, Paca Oceano). La esperantisto restos en dubo: ĉu esti lojala al la eksperta komitato aŭ al la sperta vortaristo? Ambaŭ cetere preskribas **Vjetnamo** kontraŭ la **Vjetnamio** de la esperantista popolo.

(b) Baptonomoj, esperantigitaj. Ekzistas jam de longe abunda provizo de stabile esperantigitaj formoj, sed PIV alportas la lukson de necesaj kromformoj. Se ni havas **Johano**, ni bezonas neniu **Jano**. Same **Jakobo**, **Ludoviko**, **Vilhelmo** bone taŭgas — ni malakceptu **ĵakvo**, **luizo**, **guliemo**, kiuj formoj estas nur mallertaj francismoj. — Pri la virinaj nomoj regas en PIV la metodo de Kalocsay, fari el ili iaajn adjektivojn: **Georgino** do cedis favore al **Georga**, **Sapfo** fariĝis **Sapfoa**! Lasi la nomojn neŝanĝitaj, en nacia formo, ja estas defendebla principo (**Eva**, **Anna**, **Margareta**); alio estas enmeti ilin en gramatikan kategorion, kie ili ne nature apartenas.

(c) Familiaj nomoj de famaj personoj historiaj kaj kulturaj. Kelkaj estas esperantigitaj, kelkaj ne; mi ne scias kial Waringhien skribas **Betoveno**, **Hitlero**, **Sopeno** sed **Andersen**, **Ejnstejn**, **Maŭ Ze-dong**. Laŭ mia opinio, nia centra vortaro devus registri nur esperantigitajn nomformojn; es-

### PLENA ILUSTRITA VORTARO de ESPERANTO

beställes enklast genom Esperantoförlaget. Boken sändes direkt från utgivarens exp. i England i rekommenderad försändelse. Priset innefattar sändnings- och exp.-kostnader samt 17,65 procent moms.

Pris sv. kr. 162: 35

Summan insättes vid beställningen å postgiro 578.

Förlagsföreningen Esperanto

Fack, 200 42 Malmö 7

tas tro arbitre, el la ceteraj elekti kelkajn kaj rifuzi la grandan amason. PIV enmetis sufiĉe multajn ĉinajn nomojn (en la oficiala Han-transskribo; oni do notu, ke  $b = /p/$ ,  $d = /t/$ ,  $g = /k/$ ), sed entute la nomaro (tiel geografia kiel persona) favoras Eŭropon kaj precipe Francujon.

(d) Mitologiaj nomoj, ĉefe el la klasika antikveco. Laŭ mia scio, PIV prezentas nian plej kompletan kolekton de tiu nomaro. La esperantigo estas tre konsekvenca, baziĝante sur la principoj de Wüster.

### Svedujo en PIV

Kredeble la legantoj de La Espero iom scivolas pri la pritraktado de svedaj aferoj en PIV. Kiel por la plej multaj landoj, oni citas tri formojn: **Svedio**, **-ujo**, **-lando**. (Sub **lando** troviĝas la erara informo, ke i. a. **Svedlando** respegulas nacilingvan influon.) La adjektivon **sveda** oni ekzemplas per "la sveda seriozeco, klimato, politiko, neŭtraleco; sveda ledo" (la misfamaĵ "sveda pekado" kaj "sveda pornografio" do feliĉe mankas). Sub **gimnastiko** ni trovas "sveda gimnastiko", sub **mejlo** "sveda mejlo = 10 km". **Slojdo** ne estas indikita kiel sveda specialaĵo, sed **Sero** estas "rifa rondigita insuleto, kiel ĉe la sveda marbordo". El niaj urboj trovis lokon nur **Stokholmo** kaj **Upsalo** ("kun fama universitato"). Gotenburgo ne ekzistas sur la esperanta mondmapo; iom surprize, tamen, Göteborg aperas sub de: "la kongreso de Göteborg" (tiel ankaŭ en PV; evidente temas pri la SAT-kongreso en 1928). — Niaj plej konataj personoj estas, laŭ PIV, **Lilneo**, **Nobelo** kaj **Celsio** (kial ne Celsius? La latineca nomformo, traduko de lia naskiĝloko Högen, facile tolerus esperantigon). Angström troviĝas sub la internacigita termino kreita el lia nomo: **anstromo**. Sub **Gustavo** tekstas: "Virnomo, i. a. de sveda dinastio". Sat sapienti?

### Rimarkigoj pri unuopaj vortoj

**Adasismo** 2 estas difinita "Tia rimo" (t. e. rimo per sufiksoj) sed ekzemplita "adasismoj ne estas rimoj"! — **adage** "malrapide ludota": ĉu ne ludenda? Cetere adverbo ne estu difinita per adjektivo. — **afero** 6 "La E-a movado" falsa difino; temas pri la senco 2. — **agoro**: pli bone **agora/o** pro **agora/fobio**. — **alkaja** ne kongruas kun la nomo **Alceo**, laŭ kiu tiu verso estas nomita: kial ne **alcea**? — **amoro**: oni montras al **onani**, kiu ne ekzistas en la vortaro. — **aoristo** malĝuste difinita: la greka aoristo esprimas pasintan agon nur en indikativo, ne en la ceteraj modoj. — Roma **atrio** ne havas portikon en la vera senco de tiu vorto. — **burgō** 4 "homo politike neprogesema, ne deziranta ŝanĝi la sociordon": tio ŝajnas esti difino laŭ SAT. Unue, inter la burĝaj partioj estas la liberalaj,

kiuj estas reformismaj; due, la burĝoj kompreneble ĝuste volas ŝanĝi la sociordon ekzemple en socialismaj ŝtatoj. Anstataŭe kontrastigu **burĝa** al **socialisma**. — **diatezo**: mankas la gramatika senco (aktivo, medialo, pasivo estas diatezoj). — **epsil/a**, **upsil/a** neakcepteblaj formoj por la grekaj literoj E, Y: kial -a? kial ne **epsilon/o**, **ipsilon/o**? — **edilo** havas nesufiĉan difinon; e. estis Roma magistrato respondeca pri publikaj ludoj kaj polico. — **gimnazio** ne estas nur belga, germana, rusa, sed ankaŭ skandinava. — **grapfrukto**: mankas montrilo al **pampelmuso**. — **kalemburo**: la difino "vortluda mistranĉo" estas tro malfacile komprenebla. Mi proponas "vortludo bazita sur erara disdivido de vorto(j)". — **koregrafio** laŭ la F formo; pli bone **koreografio** (tiel Wüster kaj D Choreographie, E choreography). — **lakuno** estas ne nur anatomia termino (ankaŭ pri tekstoj, vd. Scienc Revuo, vol. 17, n-ro 2, p. 45). — **leksiko** mankas (= vortprovizo, bazo de **leksikografo** ktp). — **morfemo** estas malĝuste difinita (m. estas ĉiu senchava vortelemo ne plue dividebla). — **neksta** (E next, Sv nästa) mankas sed meritas lokon almenaŭ kiel N-vorto; la **neksta numero** estas pli preciza ol la **venonta numero**. — **papiloto** estas ne nur el papero sed ofte el plasto k. s. — **pobo** "akter": de kie? Ni diris kaj uzis **poŭpo** dum pluraj jardekoj. — **Sallag/o** supozeble estu **Sal/lag/o** (Salt Lake). — **Sapfo/a**: kial do **safismo**? — **scipovi** estas difinita "povoscii" kaj tiu lasta "havi tian teorion scion, kia donas la povon fari": tro sagaca difino, laŭ mia opinio; efektive ja temas pri nura kunmeto de du elementoj, kiuj ofte konfuziĝas en la naciaj lingvoj. — **socialismo** estas pozitive difinita, **liberalismo** neŭtrale, dum **konservativismo** tute mankas (k. tamen ne estas nura emo konservi sed politika doktrino klare difinebla).

Kelkie oni renkontas malbonan Esperanton: **Soto** "piedbato en futbalan

### MONDA BANKO HELPOS NEPALAJN TELEKOMUNIKOJN

La Internacia Disvolviga Asocio, filio de la Monda Banko, ĵus aprobis seninterezan prunton de 1,7 milionoj da dolaroj al Nepalo, por helpi 5-jaran projekton pri pligrandigo kaj modernigo de la telekomunika servo de tiu lando. Oni intencas doni telefonan kaj telegrafan servojn al tiuj partoj de Nepalo, kie la ekonomiaj aŭ sociaj bezonoj estas plej urĝaj. Pli bonaj telekomunikaj rimedoj faciligos registaran administron kaj kreskon industrian kaj komercan; krome, ili helpas al turismo, kiu povus gajni por la lando multe da bezonata devizo eksterlanda.

pilkon" (al); **mung**i "purigi ies nazon el la muko" (de muko); **nordo** "tiu parto de la horizonto, kuŝanta dekstre de observanto, kiu sur la ekvatoro rigardas la subirantan sunon" (kiu kuŝas); **derivajo** "se paroli pri funkcio f(x), la limeso de la diferenckvociendo... (se oni parolas).

Preseraroj preskaŭ tute mankas, kaj mi ne povas ne esprimi ankoraŭfoje mian admiron al la presistoj kaj la preskontrolantoj. Mi ne scias, ĉu sur p. XXXIV "prohistoria" estas preseraro: se greka, tiu vorto ne ekzistas; se latina, ĝi devus esti prae-(pre-). En persona nomo sub **atonala** (Schönberg), oni presis signon kiun mi ne kredis ekzisti: kombinon de o, e kaj tremao.

### Ilustraĵoj

Mi verkis la recenzon ĝis tie ĉi, eĉ ne unufoje atentante aŭ konsultante la ilustraĵojn. Eble tio donas impreson, ke tiu parto de PIV estas nur akcesora. La bildmaterialo estas kolektita fine de la libro sur 30 platoj, ilustrantaj biologion, geometrion, arkitekturon, laborilojn, instrumentojn, muzikilojn, vestaĵojn, komunikilojn. En si mem tiu bildaro estas rimarkinda atingajo, eĉ se ĝi ne povas rivali laŭamplkse kun la klasika "Bildotabuloj por la instruado de Esperanto" (Goldschmidt—Dieterle, 1919). Tamen ĝi aperas kiel nura apendajo sen rilato al la resto de la verko; plej malbone estas, ke en la vortara teksto oni nenie montras al la ilustraĵoj. Mi ne estas kompetenta juĝi pri la kvalito de la bildoj. Sed mi ja vidas, ke kelkaj el ili estas tre detalaj (ekz. XXVIII, aŭtomobiloj), dum aliaj impresas tre supraĵe (ekz. XXII, optiko; XXIX, flugmaŝinoj). Rimarkigoj: XX 13 ne estas "cirko romana" sed amfiteatro; XXX A 10 pruo ne estas retrovebla sur la bildo.)

Kune kun la ilustraĵoj troviĝas kelkaj tabeloj pri mallongigoj kaj pri sistemoj de botaniko, zoologio kaj prahistorio. Tie ĉi mankas la internacia ISO-simbolo por Esperanto: Eo. Aldonenda estas ankaŭ L. K. = Lingva Komitato. "Heroldo de Esperanto" mem uzas la mallongigon HDE (ne: HdE). KELI signifas Kristana Esperantista (ne: Esperanto-) Ligo Internacia. La latina q. s. estu interpretata **quantum** (ne: quam) **satis**.

**Finkonkludo**. PIV, per sia kompleto kaj ekzakteco, inaŭguros novan epokon en la vivo de nia lingvo. Materiale, ĝi reprezentas kompromison inter registra kaj preskriba vortaroj; bedaŭrinde oni devas konjekti, kie ĝi preskribas. Sendube ĝi, montrante la enorman potencialon de Esperanto, konfirmas la pozicion de tiu lingvo kiel la sola rivalo de la grandaj naciaj lingvoj por la rolo de internacia komunikilo.

Ebbe Vilborg

# TIBERIO MORARIU 70-JARA

Nia antaŭa ĉefredaktoro kaj nuna literatura redaktoro Tiberio Morariu estos 70-jara la 28-an de septembro.

Li naskiĝis en la hungar-slovaka urbo Košice kaj esperantiĝis en aŭgusto 1921 (50-jara jubileo ĉi-jare!) en la rumana universitata urbo Cluj.

Lia instruisto estis alia internacie konata rumano — Andreo Cseh. Ankaŭ Tiberio Morariu fariĝis Cseh-metoda instruisto kaj gvidis kursojn kun dek miloj da partoprenantoj en dudeko da landoj. En nian landon li alvenis la 28-an de septembro (!) 1928 kaj tre multaj el la nuntempaj svedaj esperantistoj lernis nian lingvon en liaj kursoj.

Li estis ankaŭ tre populara prelegisto kaj inter 1941—1944 li estis Sindiko de SEF. La Esperon li redaktis de 1953 ĝis 1970 kaj al ĝi li dediĉas ankoraŭ grandan intereson, kiun li feliĉe ne limigas nur je la literatura parto.

Dum 1945—1950 li deĵoris kiel presa sekretario ĉe Rumana Legacio en Stokholmo, kaj li estas ankoraŭ ofte uzata kiel interpretisto kaj de la Legacio kaj de diversaj svedaj aŭtoritatuloj. En la labortagoj li ankoraŭ oficas ĉe la sveda eksportfirmo Atlas Copco.

★

## FROSTAVALEN denove en 1972

La altnivela, kultura prelegsemajno "Sveda Somera Semajno" denove okazos en Frostavallen, 30.7—6.8 1972.

Frostavallen estas idilia loko en Skanio, la plej suda parto de Svedujo, kaj situas en bela, arbara regiono apud ĉarma lageto, kie oni povas bani sin. Por tiuj, kiuj jam konas Frostavallen ni povas menci, ke la ĝisnuna, hejmeca loĝejo "Gästgården" restos, sed krome estos tute novkonstrita hotelo (preta en 1971) kun 4 etaĝoj. Ĝi estas tre moderna kun vere bona komforto kaj kun nova perfekta prelegejo.

La programo de la prelegsemajno en Frostavallen estos kiel ordinare altnivela kaj alloga kun prelegoj, diskutoj, ekskursoj, filmprezentadoj, amuzaj vesperoj ktp.

La prelegtemaro kaj la diversaj prelegoj ankoraŭ ne estas fiksitaj, sed la ĉefpreleganto estos Prof. D-ro Ivo Lapenna.

La plenan programon kaj sciiĝojn pri restadkosto ni sendos al tiuj, kiuj petos informojn de la administranto, S-ro Jan Ströme, Amiralsgatan 36, S-211 55 Malmö, Svedujo.

Petu informojn tre frue, ĉar la nombro de litoj estas limigita.

Sveda Esperanto-Instituto



Kiam oni refoliumas malnovajn jarkolektojn de La Espero, ne gravas kiom profunde en historiajn eventojn la esplorvojaĝo iras: ĉie troveblas artikoloj, rakontoj, raportoj kaj literaturaj signitaj per T.M. — Io Iu — Tiberio — Tib kaj tiel plu. Eĉ se iufoje la signaturo mankas, la verva stilo, la abundaj aliteracioj kaj en raportoj la spaconŝparaj mallongigoj malkovras ke jen TIBERIO MORARIU denove ĉerpis el sia riĉa fonto por plezurigi, kontentigi aŭ klerigi siajn multajn geamikojn.

Ne nur la legantoj de nia gazeto sed ankaŭ abunda aro da gekursanoj en dudeko da landoj havis ofte okazojn aliĝi al gratula ĥoro omaĝe al

Tiberio — komence pro profesie gviditaj kursoj, poste pro edziĝo, patriĝo, kaj inter la jardekjubileoj pro sindika laboro, foje kiel ricevanto de pacpremio kaj nun, kvankam nekredible, pro s e p d e k j a r i ĝ o.

Sed, Tiberio, ne kiel sepdekjarulon vin ĥorumas la 28-an de septembro via geamikaro, sed pro tio ke vi tiel juna atingis tiom respektendan aĝon!

Tial, akceptu la amikan bondeziiron: Estu sur resto de via vivovoj ĉiam

Sune

## TIBERIO MORARIU

*Regantoj la landlimojn fiksis,  
sed ĉionrega Amo miksis  
sangojn: infano de homar', iu  
aperis — Tiberio Morariu.  
Rumano kun patrin' hungara,  
li al svedin' en amo para  
sin ligis sub la verda stelo.  
Li vere estas hom-koktelo!  
Miksita sango vigle sukis:  
NOBELA PEKO li tradukis,  
kaj de Isac la prozpoemojn,  
partoprenigis koropremojn  
de NIĈJO MENSOGULO. Se vi  
povas finlegi sen ricevi  
larmbapton pro viv-ironi'  
vi volas malpli, do, ol mi.  
La homkoktel' originale  
verkas skizetojn malbanale  
pri siaj aventuroj, siaj  
vojaĝoj multaj kaj variaj.  
Je via san', samideano,  
bonkora hungarsvedrumano!*

Marjorie Boulton

(El Stafeta volumo Eroj 1959)

## Skall vi ha en "solkurs" igen?

— Riva del Sole i Italien lockar! —

Deltagarna i den första "solkursen" i Riva del Sole (i maj 1970) har den i ljust minne, inte minst på grund av den tacknämliga insats, som gjordes av medlemmar i esperantoföreningen i Grosseto (staden intill Riva). Skall vi försöka med en ny "solkurs" i maj 1972? I så fall måste vi mycket tidigt, **senast** den 31 dec. i år ha ett meddelande från Er, att Ni har lust följa med. Om tillräckligt antal visar intresse för en "solkurs" med vila, bad, kurs, utfärder etc., så skickar vi detaljerade upplysningar och anmälningsblankett till alla som anmält intresse. Skriv till Jan Ströme, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.

SEF

# RECENZOJ

## POR GAJAJ KLUBVESPEROJ

Marjorie Boulton: Ni Aktoras... 3 komedietoj. Eldono: Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhoj, Danlando. Broŝurita 35 paĝoj. Prezo ĉe Eldona Soc. Esperanto, Malmö. Kr. 3: 85.

Traleĝinte la novaperintan komediareton, kies tri titoloj estas "La Participoj", "Fliskapti en malpura akvo" kaj "Spertulo pri unua helpo", oni volonte konsentas kun nia fama verkistino Marjorie Boulton, kiu en sia antaŭparolo rimarkigas, ke "tiu ĉi libreto tute ne pretendas literaturan signifon aŭ valoron". "Ĝia celo", tiel diras la aŭtorino, "estas nur pedagogia: provizi ian legomaterialon modere facilan kaj iomete amuzan".

Kaj la tri komedietoj estas sendube tiel simplaj kaj simplanimaj, ke ili tre verŝajne bonege servas kiel legaĵo por nespertaj Esperantistoj aŭ, eble preferinde, kiel scenoj ludataj de vivaj aktoroj. Oni ne hezitas aserti, ke la legado aŭ aŭskultado donas horeton da amuzo. Do rekomendinda.

La ofsete tajpita preso estas klara, sed kelkajn preserarojn la tajpisto ne sukcesis eviti. Do devas atenti precipe la nesperta leganto, kiu ankaŭ en la libreto trovas kelkajn terminojn por li aŭ ŝi certe ne troveblaj en ĉiuj ĝis nun aperintaj vortaroj.

Kogo

## "PASOJ AL PLENA POSEDO"

Perfektiga antologia lernolibro de W. Auld, 30 antologiaj literaturaj legaĵoj, vortara difino de 1 682 novaj vortoj, 176 ekzercoj. 238 paĝoj.

La unua eldono de la lernolibro de W. Auld por progresantoj renkontis tian sukceson, ke ĝi elĉerpigis en malpli ol unu jaro.

La dua reviziita eldono aperis fine de 1970 en Praha, en 5 200 ekzempleroj, kiel komuna eldono de Heroldo de Esperanto kaj Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

La lecionoj baziĝas sur analizo de originala aŭ traduka literatura legaĵo verkita aŭ tradukita de fama Esperanto-aŭtoro (de Dinwoodie kaj Privat ĝis Pumpr, Rossetti, Kalocsay kaj Zamenhof).

Mendu ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö. Prezo kr 16:50 kun imposto.

★

— Ĉu vi scias, fraŭlino, la diferencon inter aŭtomobilo kaj aŭtobuso?

— Nee?

— Bone, tiam ni prenos aŭtobuson.

## NI DEVAS ADMIRI NIAJN ESTONAJN GEAMIKOJN!

Niaj najbaroj, transe de la Balta Maro, meritas nian grandan admiron. Mi pensas pri la bravaj, persistaj kaj modele laborantaj geamikoj esperantistaj en Estonio. Inter ni "mezaĝaj" en la movado estas multaj, kiuj ankoraŭ bone memoras la tempon de bone organizitaj ŝipvojaĝoj de Esperanta Turista Komisiono. Blovis multaj ventoj ĉirkaŭ niaj reciprokaj marbordoj depost tiam!

Fakte estas mirinde, ke niaj estonaj gesamideanoj tre energie kaj progresive laboras por la internacia lingvo. Iiaj kursoj estas ne nur grandaj (40—50 partoprenantoj) sed ankaŭ multaj tra la tuta lando. Kluba vivo estas vigla kun konferencoj, someraj renkontiĝoj, seminarioj ktp. En la baltikaj landoj la esperanta movado entute marŝas antaŭen! Estas necese starigi la demandon: Kiel statas nia laboro — aliflanke de la Balta Maro — kompare kun tiu de niaj najbaroj?

Grava, signifoplena estas la atingoj en Estona Radio, Tallinn. Jam depost novembro 1970 okazas regulaj disaŭdigoj — fakte en la kadro de la svedlingvaj programoj de Tallinn — Ĝun antaŭlastan vendredon de la monato je la 22.40—23.00 h. Ondolongo: 290 m (samtempe kurtonde 49 m-bendo). La svedlingva programo komencas jam je la 22.05 h. Aŭskultante ĝin vi povas ĝustatempe kapti la stacion kaj resti ĉe ĝi ĝis la programo en Esperanto.

La 19.3 parolis en modela Esperanto la estona ministro de Edukado, s-ro Ferdinand Eisen. Samprograme parolis ankaŭ s-ro Johannes Palu, unu el la meritoplenaj kaj aktivaj esperantistoj en Tallin. Permesu al mi mencii la nomon de Jaan Ojalo, la gvidanto de la Esperanto-sekcio de Estona Radio. Inter la parolantoj aperis jam aŭtune nia malnova amiko Henrik Seppik kun longa alparolo al siaj svedaj, entute skandinavaj, kaj alilandaj geamikoj. Ofte aperas kantistoj, kiuj kantas en Esperanto.

Kara leganto! Montru vian estimon al niaj estonaj samideanoj. Aŭskultu la programojn, skribu mem kaj skribigu aliajn en kaj ekster nia lando. Nur tiel ni povas montri nian aprezon kaj instigi al daŭra laboro!

Lennart Åberg

★

Knabino pasigis sian ferion en la kamparo, kie ŝi bone amikiĝis kun la filo en la bieno. Vesperon ili promenis sur la kampoj ĝuste kiam la suno estis glitonta sub la horizonton. Tiam ili ekvidis bovidon, kiu frotis sian buŝon kontraŭ la buŝo de la bovino.

— Jen rigardu, diris la juna viro, mi havas inklinton fari la saman.

— Faru tion, diris la knabino, estas ja via bovino.

## ELDONA SOCIETO ESPERANTO

La jarkunsido okazis en la pentekosta tago. La raporto de la estraro estis aprobata kaj la bilanco konfirmita. La estraro estis reelektita (Sven Sjöblom, prezidanto, Tiberio Morariu kaj Per Törnegrén).

La plej granda projekto de la eldonejo nun estas la nova sved-esperanta vortaro, kiu postulos grandan kapitalon. La kompilanto, Ebbe Vilborg, verŝajne finpretigos la manuskripton dum tiu ĉi jaro. Oni diskutis diversajn eblecojn presigi la vortaron, kaj Oskar Svantesson, Göteborg, deklaris sin preta kunhelpi.

Ankaŭ je tiu kunveno aperis la problemoj pri lernolibroj. Restas tre granda stoko de "Allas andra språk", kaj oni havas ankaŭ la kurson de Fritz Lindén. Ĉe alia eldonejo krome aperis la lernolibro de Auld prilaborita por svedoj de Erik Carlén. Ĉar oni ne povas simple forĵeti grandan stokon ne eblas ĵus nun eldoni ankoraŭ novan lernolibron.

Oskar Svantesson esprimis la dankon de la esperantistoj al la estraro kaj speciale al s-ino Anna-Greta Strönné, la prizorgantino de la eldonejo.

## ĈIRKAŬ LA MONDO KUN ESPERANTO

S-ro Osvald Nicolaisen iĝos pensiulo la 13-an de Aŭgusto (aĝos 65-jara). Post la 12-jara laboro kiel oficisto ĉe aŭtomobila firmao kaj loĝejo en Styrningsgatan 55 en Stockholm, li ekveturos tra jenaj landoj: Sovet-Unio, Japanio, Hong Kong, Tajlando, Singaporo, Cejlo, Hindio, Nepalo, Pakistanio, Afganistanio, Irano, Irako, Turkio, Bulgario, Rumanio, Ĉeĥoslovakio kaj Germanio al Stokholmo kaj daŭrigos poste tra Ameriko.

Dum la vojaĝo kiu daŭros dum unu jaro li povos viziti kaj prelegi en Esperanto-grupoj, kiuj deziras tion.

S-ro Nicolaisen gvidis multajn kursojn (pli ol 80) antaŭ la milito en diversaj landoj por pli ol 2 000 partoprenantoj. Li instruis Esperanton ankaŭ dum la tempo kiam li estis konstanta kongresa sekretario por UEA-kongresoj (1947—51).

En Norvegio li fondis 28 klubojn kaj infangrupojn. Li ankaŭ faris multajn prelegojn kaj provlecionojn laŭ Cseh-metodo.

★

La aŭtomobilfirmao Fiat, kiu uzas esperanton de post 1964, nun eldonis du novajn prospektojn en esperanto pri la modeloj 124 Special kaj 124 Special T. Prospektoj riceveblaj ĉe Fiat, Corso Marconi N 10, 101 00 Torino, Italujo.

## LA PREZ. DE UEA:

(SALUTO AL LA JARKONGRESO DE SEF)

Karaj Amikoj,

Okaze de la jara Kongreso de via Federacio mi havas la plezuron sendi al ĉiuj partoprenantoj de la Kongreso la plej korajn salutojn kaj bondezirojn en la nomo de UEA kaj en mia propra.

La Sveda Esperanto-Federacio estis dum multaj jaroj kaj plu restas unu el la plej fortikaj kolonoj de la tutmonda Esperanto-Movado. Ĝia laŭcela kaj firma agado por la Internacia Lingvo estas inspira por multaj. Ĝiaj sukcesoj kaj atingoj estas samtempe sukcesoj kaj atingoj de ni ĉiuj, ĉar ja ni ĉiuj laboras por la sama idealo tute egale ĉu nia agado okazas en tiu aŭ alia mondo-parto, sur tiu aŭ alia nivelo. Estus naive fermi la okulojn antaŭ la realaĵo kaj ne vidi, ke la plena realigo de la celo renkontas ĉiaspecajn malfacilaĵojn kaj obstaklojn. Multaj antaŭjuĝoj malhelpas nian agadon; grandaj politikaj fortoj kontraŭas vastigon kaj profundigon de internacia kompreniĝo, kiu certe ne povas okazi sen komuna lingvo; kulturaj imperiismoj altrudas siajn respektivajn lingvojn kaj havas enormajn financajn rimedojn je dispono. De la alia flanko trovigas niaj organizaĵoj, dependantaj unuavice de la sindono, oferemo kaj konscio pri la praveco de la afero, praktike sen materiaj rimedoj, se oni komparas ilin kun tiuj de la kontraŭuloj. La situacio certe ne estas facila. En tiaj kondiĉoj harmonia kunagado por la komuna celo, reciproka subteno, firma apogo al ĉiuj niaj organizaĵoj ekde la lokaj grupoj ĝis nia vasta kaj granda UEA estas necesaj por plua progresado.

Dezirante al via Kongreso sukcesplenan laboron kaj al via Federacio pluan prosperadon, mi restas tre kore kaj sincere via

**Prof. Dro Ivo Lapenna**

### RENKONTIGO EN GÖTEBORG 18/9

KELI aranĝos esperantistan renkontigon en Göteborgs Arbetarinstitut (Magasinsgatan 23) sabate la 18-an de septembro je la 18-a horo. El la programo: Roland Dupuis kun "Festo en Parizo", muziko-kolorbildoj.

Precipe atentu esperantistoj en okcidenta Svedujo. Ĉiuj bonvenaj!

## ESPERANTO - ASOCIO DE FINNLANDO

Box 13048 Helsinki 13

### PLANOJ POR KUNLABORO INTER SVEDOJ KAJ FINNOJ

Lige kun la jarkongreso de SEF la sekretario de la landa asocio en Finnlando, s-ro Jorma Ahomäki, havis eblecon pritrakti proponon pri eventuala kunlaboro inter svedaj kaj finnaj esperantistoj. La estraro de SEF pozitive rilatis al la planoj aranĝi komunan renkontigon por svedoj kaj finnoj aŭtune 1972 dum iu semajnfino kaj en Stokholmo kaj en Turku samtempe tiel, ke oni reciproke vizitos la menciitajn urbojn dum unu semajnfino. Pri detaloj pliaj informoj poste.



S-ro Jorma Ahomäki (maldekstre).

### TUTLANDA AUTUNA KONFERENCO EN TAMPERE

Tradicia aŭtuna renkontiĝo de finnaj esperantistoj okazos en Tampere 30—31. de oktobro 1971. Prelegos i. a. polino Stanisława Mehtonen el Oulu kaj italo Franko Luin el Stokholmo. Lokaj aranĝantoj atendas partoprenon de ĉirkaŭ 100 esperantistoj. Eksterlandanoj estas kore bonvenaj.

### ORTODOKSA ĈEFEPISKOPO MEMBRO EN LANDA ASOCIO

Jam kelkajn jarojn tre regule inter la unuaj jarkotizoj alvenis tiu de ĉefepiskopo Paŭlo el la urbo Kuopio, kies loka societo petis rajton aranĝi S. A. T.-kongreson en sia hejmurbo. Espereble la planoj realiĝos kaj aktivaj kuopioanoj havos eblecon montri sian fruktodonan aktivecon.

### KAMPANJO POR KOLEKTADO DE SUBSKRIBOJ

Esperanto-Asocio de Finnlando organizos kampanojn por kolekti subskribojn inter parlamentanoj, ministroj kaj aliaj kvalifikitaj personoj por kandidatiĝi UEA kiel eventuala ricevonto de Nobel-pacpremio. Iuj finnaj parlamentanoj jam promesis sian helpon en la agado. Efikan kaj konkretan subtenon al la kampanjo donas ankaŭ simila laboro de Ib Schleicher en Danlando.

### D-RO J. C. WELLS EL LONDONO VIZITIS EN FINNLANDO

La prezidanto de la 56-a U. K. en Londono, d-ro Wells faris profesionan prelegviziton julie en Helsinki. La landa asocio utiligis la okazon kaj aranĝis du fruktodonajn intervjuojn por konataj semajnaj revuoj "Seura" kaj "Me naiset". Ambaŭ periodaĵoj favore skribis kaj la laste menciita eĉ donis adreson, per kiu oni povas ricevi pliajn informojn pri la Internacia Lingvo.

### SOMERA KAMPADEJO EN ISORANTA

Sukcese finiĝis somera kampadejo en Isoranta, kie kiel ĉefinstruisto laboris s-ro F. Moravec el Germanujo. Ĉirkaŭ 100 partoprenantoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj. En la programo troviĝis diversaj prelegoj pri U. N. kaj Unesko, ekskursoj kaj distraj aranĝoj.

### IVA ABERG GVIDIS KURSON EN JYVASKYLA

Unusemajnan kurson en Jyväskylä gvidis s-ino Iva Åberg el Gotenburgo. Pri la aranĝo respondecis vigle aganta loka societo. Simila kurso estis aranĝata jam kelkajn jarojn kaj oni daŭrigas la instruadon ankaŭ estontece.

### NOVA BROŝURO PRI TURKU JAM APERIS

La Urba Turisma Oficejo publikigis tute novan, multkoloran broŝuron pri la havenurbo Turku en Esperanto. Ĝi estas laŭvice jam la tria. La unuaj du eldonoj tre rapide elĉerpigis kaj nun 10 000 ekzempleroj atendas sian eblecon servi turistojn esperantistajn.

### SENDU POSTKARTON AL TURKU, VI POVAS GAJNI PUPON!

La Tagon de Turku ni festas ĉi-jare 19.9. Nun la Urba Turisma Oficejo aranĝas konkuron por la tuta esperantistaro en la mondo. Vi devas nur sendi poŝtkarton, kiu prezentas vian regionon, urbon aŭ landon, al la adreso:

LA TAGO DE TURKU

Box 66

201 00 Turku 10, Finnlando.

Inter la senditaj kartoj oni lotumas dek belegajn pupojn, kiuj estas vestitaj laŭ la stilo en la komenco de nia jarcento. La kartoj devas esti en Turku antaŭ la fino de oktobro — 30.10 1971.

Pri la konkuro vi povas rakonti ankaŭ al ne-esperantistaj konatoj — eĉ al ne-esperanta gazetaro! La ideo ja interesas ĉiujn. Agu kaj sendu vian karton tuj. Jam hodiaŭ!

# NI GRATULAS



## W. WAHLUND 85-JARA

La respondeca eldonanto de La Espero, direktoro W. Wahlund estis 85-jara la 5-an de aŭgusto.

La sveda leĝo postulas, ke nia gazeto same kiel ĉiuj periodaĵoj havu respondecan eldonanton, sed ĝuste tiu

## NY INFORMATIONSBROSCHYR

En ny broschyr för information om esperanto — ett litet behändigt flygblad — har just kommit ut. Föreningarna kan gratis erhålla begränsat antal och det kan även enskilda esperantister på orter där föreningar saknas. (Större kvantiteter kan beställas till självkostnadspris.)

Hjälp till att sprida information. Skriv idag! **OBS! Broschyren skall omedelbart spridas ut på lämpligt sätt. Den får på inga villkor bli ligande i föreningarnas gömmor!**

Svenska Esperanto-Förbundet  
Jungfrugatan 30  
114 44 STOCKHOLM

tasko certe ne multe ĝenis s-ron Wahlund. En la historio de La Espero li tamen ludis multe pli gravan rolon.

Inter la iniciatintoj de la gazeto li certe estis la plej grava, kaj dum la unuaj jaroj li ankaŭ finance respondecis por ĝi. Tiel en 1915 li fondis garantian fonduson je 3.000 kronoj al kiu li mem kontribuis per 2.000.

Li fariĝis esperantisto jam en 1905—06 kaj apartenis antaŭ la unua mondmilito al la estraro de Gävle Esperanto-Förening, kiu dum kelkaj jaroj estis la plej forta esperanto-societo de Svedujo. En 1913 li organizis en Gävle "Tut-sveda Esperanto-Tago" kaj fariĝis vic-prezidanto de SEF.

Certe s-ano Wahlund ankaŭ aliel grave kontribuis al la progreso de Esperanto en Svedujo, — sed evidente li estis modesta homo kiu ofte laboris silente en la malantaŭo kaj ne ĉio estas konata al la nuntempa esperantistaro. Tiu fakto tamen neniel malpligrandigas lian signifon kaj ni varme gratulas kaj bondeziras!

Ake Blomberg

## ROSBACH 50-jara

La ĉefredaktoro de Norvega Esperantisto, Johan Hammond Rosbach, estos 50-jara la 22-an de aŭgusto. Krom aktiva agado en la norvega movado li grave kontribuis al la originala literaturo de Esperanto. Lia unua novelaro, Bagatelaro, aperis jam en 1951, lia kvara, Disko, aperis pasintan jaron. La Espero kore gratulas!

## WARINGHIEN 70-jara

La prezidanto de Akademio de Esperanto kaj kompilanto de Plena Ilustrita Vortaro, Gaston Waringhien, estis 70-jara la 29-an de julio. Ni kore gratulas!

## KURSO EN GOTENBURGO

En Gotenburgo la memstara grupo Inter tiun ĉi jaron starigos kurson por komencantoj en kunlaboro kun Kursverksamheten vid Göteborgs universitet (Fondajo por Kursagado en Universitato de Gotenburgo). Post persona intertraktado kun la rektoro, d-ro Bengt Wallerius, la aŭtuna programo havos specialan prezentan artikolon sub la rubriko: Lingvo Internacia — Esperanto.

La programo estos distribuita en 80 000 ekzempleroj (tiun ĉi aŭtunon supozeble en 100 000 ekz.) laŭ informo de la lingvofaka kancelario.

Inspektoro de la kurso estos d-ro Ebbe Vilborg, docento de greka lingvo en la universitato kaj, kiel konate, membro de Akademio de Esperanto. La kurson gvidos s-ino Iva Aberg. Pro manko de oportuna instrumaterialo por svedoj la agadgrupo Inter mem iniciatis novan lernilon "Familio Mondano", uzeblan ne nur en kursoj sed ankaŭ por memstudado kaj korespondaj studoj. La novan instrumentodon oni uzos unuan fojon en la aŭtuna kurso.

Krom la oficiala propagando por la nova kurso, Inter-grupo dissendos ĝustatempe specialan informilon kun invitilo al ĉiuj geinstruistoj de Gotenburgo per persone adresita letero, entute proksimume 3 500. Estas grave laŭ Inter, ke oni uzas ĉiun okazon por interesi ĝuste instruistaron por la internacia lingvo; se ni iam sukcesu en la lernejoj, estas necese havi profesiulojn pretaj por la instruado.

★

Internacia Pedagogia Revuo aperis per sia unua volumo. Redaktoro rektoro Helmut Sonnabend. Abonprezo 6 GM. Ludwig Pickel Eldonejo, Postfach 2113, D-85 NÜRNBERG 2, Postĉekkonto Nürnberg 81956.

Konstrui per

# YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

## YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

# INFÖR HÖSTENS KURSER

## Esperantoförlaget föreslår:

### NYBÖRJARKURSER

Kurser i Esperanto bör årligen startas i föreningarnas regi. En enskild medlem kan lätt få igång en **studiegrupp** genom att intressera några arbetskamrater eller goda vänner. För alla slag av kurser finns läromaterial:

### ALLAS ANDRA SPRÅK ESPERANTO

(E. Malmgren) ..... 8:—  
Välkänd, lättanvänd, omväxlande och roande lärobok, speciellt gjord för kurser. Läraren kan helt följa läroboken.

ESPERANTOKURS (F. Lindén) ..... 9:—  
Mera omfattande lärobok med utförliga grammatiska förklaringar. Särskilt användbar i kurser, där deltagarna önskar ingående studier i Esperanto eller har tidigare språkundervisning. Denna lärobok kräver något mer förarbete av läraren.

### ESPERANTO PER POST

Korrespondenskurs (10 brev) ..... 15:—  
Instruktiv, lättfattlig, intressant. Går utmärkt att använda som kursmaterial. Kursdeltagare sänder genom ledaren gemensamt in lösningarna till Esperantoförlagets rättare. Undervisande lärare krävs således ej för denna kurs. En kunnig kursledare kan naturligtvis även själv rätta lösningarna. Var god meddela vid beställningen hur kursen lägges upp.

### INTERNACIA ELPAROLO

Uttalsskiva, med texthäfte ..... 5: 75  
Modern 33-varvs grammofonskiva, intalad av flera kända internationella röster. Bra hjälp i en nybörjarkurs för inlärandet av rätt uttal.

KORRESPONDERA MED HELA VÄRLDEN (R. Pehrsson) ..... 2:—  
God hjälp och ledning för en nybörjare. Exempel på brevformulering från enkla hälsningar till mera avancerad skriftväxling.

SVENSK—ESPERANTISK PARLÖR (R. Pehrsson) ..... 1:—

SVENSK—ESPERANTISK ORDBOK (S. O. Jansson, F. Lindén, B. Gerdman) 24:—  
Fullständig ordbok med många exempel.

ESPERANTO—SVENSK ORDBOK (P. Nylén) ..... 16:—

LILLA ORDBOKEN (E. Vilborg) ..... 12:—  
Behändig och modern Svensk—Esp. och Esp.—Svensk fickordbok.

EL LA VIVO DE L. ZAMENHOF (G. Henriksson) ..... 2: 75  
Dr Zamenhofs ungdom skildrad i enkla fraser just för nybörjare. En "obligatorisk" bok för alla kursdeltagare.  
Vidare föreslår vi:

KORRESPONDENSANNONS förmedlas av Esperantoförlaget i internationell tidning (Heroldo) ..... 6: 75

Sådan annons kan sättas in redan efter någon månad. Eftersom det sedan dröjer ung. 1 månad innan tidningen med annonsen kommer ut, kan kursdeltagare vid den tidpunkten mycket väl föra en enkel korrespondens, t. ex. per vykort. Detta stimulerar och ger bevis på Esperantos användbarhet.

Sådana annonser förmedlas givetvis även till andra internationella tidningar, t. ex. Revuo Esperanto. Priserna varierar därvid.



För övrigt bör kursledarna och lärarna stimulera elevernas intresse för egen läsning. Detta ger vana och gott ordförråd. Förslag till lätta läseböcker finns i UEA:s årsbok, boklistan. Vi skaffar allt som önskas.



### FORTSÄTTNINGSKURSER

Delar av nybörjarkursen bör snabbrepeteras. Därefter kan man **noggrant** genomgå

SVENSK ESPERANTO GRAMMATIK (E. Carlén) ..... 15:—

Dessutom bör en intressant bok läsas och diskuteras. Boken skall väljas efter kursdeltagarnas förkunskaper.

Som första bok föreslår vi:

VIVO VOKAS (S. Engholm) häft. 7: 50 inb. 10:—  
En originalroman om ungdom på utomordentlig Esperanto, lätt men perfekt språk. Den mest använda boken för fortsättningskurser.

OBS. På alla beställningar utom korrespondenskurser tillkommer moms 17,65 proc. Vi sänder gärna mot postförskott.

Andra förslag:

LA GRANDA AVENTURO (F. Szilágyi) ..... häft. 7: 50 inb. 10:—

Trevliga och underhållande noveller, orig. Esp.

NORMANDAJ RAKONTOJ (G. de Maupassant) ..... 22:—

Berättelser från Normandie, övers. R. Dupuis. För mer Esperantokunniga.

För övrigt kan alla Esperantoförlagets utgåvor rekommenderas för såväl gott språk som intressant innehåll. Boklista sändes gärna på begäran.

## Förlagsföreningen Esperanto

Fack

200 42 Malmö 7. . . . . Postgiro 578-5

57-a  
**UNIVERSALA KONGRESO**  
**de Esperanto**



29 juli—5 augusti 1972  
 PORTLAND (Oregon) USA

blir platsen för esperantovärldskongressen 1972. Anmäl Eder redan nu till kongressen. Svensk förmedlare (Peranto) av kongressanmälningar är som vanligt endast Svenska Esperanto-Förbundet.

Anmälningssblanketter erhålles efter rekvisition hos s-ino Ester Andrén, Ryttmästaregatan 12, 217 52 Malmö (tel. 040/652 09).

Anmälan. Anmälningssblanketter och sedermera även beställningar av logi och utfärder skall insändas till samma adress, s-ino Andrén, Malmö, och icke till Holland eller USA.

Likvid. Avgifterna insättes på postgirokonto 14 74 29-5. Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö.

**KONGRESSAVGIFTER**  
 (Obs! Svenska kronor)

	Till 31/12 1971	Till 31/3 1972	Till 20/6 1972	Efter 20/6 1972
1. Kongresano, ne membro individua de UEA	150:—	165:—	180:—	218:—
2. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun jarlibro (MJ)	128:—	143:—	158:—	195:—
3. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA)	105:—	120:—	135:—	173:—
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1	105:—	116:—	126:—	164:—
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 2 aŭ 3	90:—	100:—	111:—	148:—
6. Junul(in)o ĝis inkl. 20-jara	45:—	50:—	54:—	92:—
7. Universitata student(in)o ĝis inkl. 30-jara	75:—	83:—	90:—	128:—
8. Blindul(in)o	60:—	66:—	72:—	110:—

Var vänlig skriv namn etc. tydligt på anmälningssblanketten men ej några avgifter (det gör SEF). Meddela i stället allting tydligt på postgirotalongen.

Rabatt får som synes direkta medlemmar i UEA. Det lönar sig alltså att bli direkt medlem. Ni vinner många fördelar. Gör allvar av att anmäla Er som direkt medlem av UEA.

Gåvor: Som vanligt mottager SEF och vdarebefordrar gåvor till Litteraturfonden (tävlingspremier), Blindfonden (de blindas kongress), Adopta Kaso (för dem som ej kan betala från eget land) och Adoptaj Gepatroj (för barnkongressen). Givares namn publiceras. Svenskarna bör observera dessa fonder, även om Ni själva ej skall resa till kongressen. Lämna gärna Ert bidrag.

SEF

# La Espero

Svenska Esperanto-Tidningen  
 Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Adreso: Krokvägen 85, 122 32 Enskede.

Cefredaktoro: Åke Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping. Tel. 0510/235 26 (laborejo 0510/221 30).

Literatura redaktoro: Tiberio Morariu.

Teknika redaktoro: Sune W. Ahlm.

Prezo de jarabono: 15 sv. kr. (postčeka konto 20 12).

Prezo de anoncoj: 1/1 paĝo 180:—, 1/2 = 90:—, 1/3 = 60:—, 1/6 = 30:—, 1/12 = 15:—.

Millimetra prezo 40 öre.

Korespondananco: 25-vorta = 4:—, 50-vorta = 8:—.

## SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

SVEDA ESPERANTO - FEDERACIO



Adreso: Jungfrugatan 30, 3 tr.  
 114 44 Stockholm

Girkonto: 20 12

Telefona: 08/62 58 76

Dejortempo: Merkrede 18—20a horo

Kotizoj por Rektaj membroj: 15 kr., junuloj 7 kr.  
 familia membro sen gazeto 5 kr.

### ESTRARO

Prezidanto: Jan Ströme, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.  
 Tel. 040/12 92 11.

Vicprezidanto: Ragnar Hjorth, Kronobergsgatan 25, 4 tr 8. g.,  
 112 33 Stockholm. Tel. 08/52 76 67.

Sekretario: Sven Alexandersson, Krokvägen 85,  
 122 32 Enskede. Tel. 08/49 80 24.

Kasistino: Maria Wästfelt, Cedergrensvägen 27,  
 126 36 Hägersten. Tel. 08/45 02 41.

Bertil Åkerberg, Lillsvängen 39, 126 57 Hägersten.  
 Tel. 08/46 29 65.

Artur Malmkvist, Asögatan 182, 116 32 Stockholm.  
 Tel. 08/41 78 74.

Franko Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.  
 Tel. 08/712 82 91.

Ulla Luin (sama adreso)

Tomas Jansson, Bjassevågen 1 B, 712 00 Hällefors.  
 Tel. 0591/120 90.

## FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42, Malmö 7  
 Ejo: Möllevångsgatan 20 B



Dejortempo 1 sept.—15 majo:  
 merkrede 10.00—11.00 jaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578.



Administranto: Anna-Greta Ströme  
 Prezidanto: Sven Sjöblom, tel. hejma: 040/11 25 78